

La Felicità Ami

(Facilaj Legaĵoj)

Claude Piron

e-Librigita de Elerno

jan.2008

Claude Piron



Biografio

Svisa psikologo kun forta intereso pri lingvoj, diplomito de la Interpretista Lernejo de Ĝeneva Universitato, Claude Piron (Namur, 1931) estis tradukisto en UN (Novjorko) de 1956 ĝis 1961 (francen el la angla, ĉina, hispana kaj rusa).

Li poste laboris ok jarojn en Monda Organizo pri Sano, i.a. en Orienta Azio kaj Afriko. Trejnita kiel psikanalizisto kaj psikoterapiisto, li komencis praktiki psikoterapion en 1969 en la ĝeneva regiono (de 1999 en Gland, Svislando). Li instruis en la Psikologia kaj Edukscienca Fakoj de Ĝeneva Universitato de 1973 ĝis emeritiĝo en 1994. Lia ĉefa nuna aktiveco, krom la psikoterapia praktikado, estas profesie trejni junajn psikoterapiistojn, per kontrolo de ilia laboro kaj partopreno en trejnaj seminarioj. Li ofte prelegas pri psikologiaj problemoj, ĉefe en rilato kun la spirita vivo, aŭ (malpli ofte) pri internacia komunikado kaj Esperanto.

Lia verko "*Le défi des langues*" ("La lingva defio"), kiu estas iom psikanalizo de internacia komunikado, estis eldonita ĉe L'Harmattan (Parizo) en 1994. Li publikigis en Esperanto ok romanojn, plurajn novelarojn, poemaron kaj kantokasedon. Li publikigis diverslingve multajn artikolojn pri internacia kaj interkultura komunikado, kaj pri psikologio. Li aŭtoris aŭ kunaŭtoris tri franclingvajn librojn pri psikologiaj temoj.

La feliĉo ami

Mi estas psik-analizisto. Kio estas tiu besto, vi eble vin demandas. Nu, mi estas homo, kiu havas iom neordinaran laboron: mia ĉiutaga laboro estas helpi al homoj kiuj venas al mi tiucele, iĝi pli feliĉaj. Por tio, ili devas diri al mi ĉion, kion ili pensas.

Se venas iu ideo, nu, tiun ideon ili devas vortigi. Ne gravas ĉu la ideo estas ĝusta aŭ malĝusta, bela aŭ malbela, homa aŭ besta, plenkreskula aŭ infana. Ne gravas ĉu ĝi plaĉos al mi aŭ malplaĉos: ĉiun ideon la persono devas diri tuj, kiam ĝi naskiĝas en li aŭ ŝi. Ke homoj konsentas tiel pensi aŭdeble antaŭ fakulo, kiun ili ne vere konas, tio estas miriga, sed tio estas fakto.

Ne malpli mirige estas rimarki ke tiu metodo utilas. Ankaŭ tio estas fakto. Eĉ se ni ne vere komprenas ĝin. (Kompreneble, por ke la afero sukcesu, ili devas revenadi multfoje, ĉar nur iom post iom la kaŭzoj de iliaj malfeliĉoj aŭ vivmalfacilaĵoj montriĝas eksteren.) Nu, mi ne priskribos al vi la tutan aferon, ĉar ĝi estas ege malpli simpla, ol povas unuavide ŝajni. Kaj verŝajne multaj el vi jam scias pri ĝi. La demando ĉi tie ne estas, kial psik-analizo funkcias, nek kiel nek kiom. Se mi parolas pri ĝi, tio havas plej simplan kaŭzon, jenan:

Kiam iu venas por submeti sin ĉe mi al psik-analizo, tiu devas kuŝi, lasi la pensojn veni kiel eble plej nature, kaj vortigi ĉion kio prezentiĝas al li aŭ ŝi en la kapo (la kapo, tio estas la parto de ni, tute supre, kie troviĝas nia "pensejo" aŭ "pensujo", aŭ se vi pli ŝatas "pensilo", kiu estas ankaŭ, fakte nia "sentejo" aŭ "sentujo" aŭ "sentilo"). Mi sidas malantaŭ tiu persono - li aŭ ŝi ne vidas min - kaj skribas ĉion, kion ŝi aŭ li diras. Mi uzas stenografion (tio estas rapidskribo, metodo skribi, ne kiel ordinare, sed per alia skribmaniero, kiu ebligas skribi same rapide kiel la persono parolas). Nu, hodiaŭ, dum mi rapidskribis ĉion, kion rakontis al mi juna viro, kiu faras psik-analizon kun mi, frapis min jena penso: ĉiuj liaj vortoj troviĝas inter la 500, kiuj sufiĉas por la facila teksto lernata laŭ la Zagreba Metodo. Eble - mi pensis - interesos la legantojn scii, kion tia homo rakontas en tia situacio. Mi, do, ĉi-sekve prezentos al vi, kun la permeso de la junulo, kelkajn partojn el lia eldirado.

* * * * *

Sofia vidis sian antaŭan kunvivulon vendredon vespere. Mi ne reagis tre bone ĵaŭdon, kiam ŝi parolis al mi pri tiu decido rerenkonti lin. Mi ne montriĝis amika. Mi diris al ŝi: "Sufiĉas nun. Aŭ vi estas kun li, aŭ vi estas kun mi. Ne eblas havi du virojn samtempe, mi tion ne akceptas."

Vi konas min nun de kelka tempo. Vi scias, ke mi ordinare ne parolas tiel. Sed, mi ŝanĝiĝas: dum mi parolis mi eĉ demandis min, kion mi faros, se ŝi reagos per ega malkontento. Antaŭe tiu zorgo malhelpus min vortigi mian opinion. Sed ŝi respondis al tio tute bone. Ŝi diris: "Kion vi diras, tio estas ĝusta. Mi devus agi klare. Fakte, mi devus sukcesi seniĝi je li. Mi ne plu amas lin. Eble mi neniam vere amis lin. Vi estas la viro por mi. Neniu alia. Sed li aperas tiel malfeliĉa, kiam mi parolas pri vera fino, pri disiĝo, pri apartiĝo porĉiama, ke mi ne trovas en mi la forton rigardi lin kaj diri: ĉi-foje estas la fino. Mi ne plu volas revidi vin."

Mi rimarkas ke nun estas malpli kaj malpli da problemoj inter Sofia kaj mi. Eble, ĉar ni decidis ĉiufoje klarigi la aferojn unu al la alia. Komence ni ne povis. Nek ŝi nek mi. Ni kaŝis la veron pri tio aŭ tio ĉi. Ni timis ke, se unu el ni diros la veron, la alia lin forlasos. Sed nun montriĝas, ke ŝi tiom deziras resti kun mi, kiom mi kun ŝi.

Hodiaŭ estas ŝia naskiĝtago. Mi aĉetis ion tre belan por ŝi. Mi esperas ke ŝi estos kontenta. Ni faros etan feston. Nur ni du. Ni iros al loko, kiun mi konas, por bonega, neordinara, ŝatinda vespermanĝo. Tio, kion ili tie preparas, estas tute speciale manĝinda. Mi estas certa, ke plaĉos al ŝi. Mi sentas, ke ni estos feliĉaj. Tiu knabino pli kaj pli plaĉas al mi ĉiurilate, ankaŭ en la diversaj situacioj de la ĉiutaga vivo. Unuafoje mi amas tiamaniere. Antaŭe, kiam mi opiniis, ke mi amas, mi fakte nur ludis kun bildoj en mia kapo: mi ne rilatis kun io vera. Estas mirige: mi sentas min pli riĉa. Pro tiuj kunaj travivaĵoj. Pro ĉio, kion ŝi diras al mi. Pro ŝia maniero iri, paroli, ludi, ridi aŭ fari tion aŭ tion ĉi kun mi. Jes, pli riĉa.

Sed mi estas riĉa nur rilate al la sentoj. Mi ne scias kiam mi povos pagi vin. En mia laboro, multo malbone funkcias. Mi havis okazon havi alian laboron, multe pli bonan ol la nuna estas, sed mi ne kaptis ĝin. Mi lasis la tempon flugi. Nun estas tro malfrue. La ulo, kiu povis doni tiun laboron, hieraŭ diris al mi: "Kial vi ne venis antaŭe? Nun mi havigis ĝin al iu alia. Mi preferus ke estu vi, ĉar vi estas pli juna, kaj ĝuste junulon mi bezonis, sed nun estas tro malfrue."

Kial mi agas tiel kontraŭe al mia propra bono? Se vi demandos min, kial mi ne iris, mi eĉ ne povos respondi. Mi ne scias. Ŝajnis al mi, ke mi havas tempon. Kial decidi rapide, mi diris al mi. Morgaŭ sufiĉos. Sed nun mi perdis tiun mirindan okazon. Ili pagus al mi multe pli, por ne pli da laborhoroj, ol mi nun ricevas. Kaj eĉ ŝajnas al mi ke tiu laboro estas pli facila. Kelkfoje, en simila okazo, kiam mi rimarkas, ke mi agis malĝuste, mi deziras frapi min, kiel patro malbonan filon, tiel malŝatinda mi trovas min. Sed tio ne estas la unua fojo. Tre ofte en la vivo mi perdis bonajn okazojn. Kelkfoje mi min demandas, ĉu mi vere volas plibonigi mian vivon, aŭ ĉu io en mi malhelpas min agi por iĝi feliĉa.

Vi memoras pri Nadja, ĉu ne? Mi parolis pri ŝi la lastan fojon, kiam mi venis. Mi vizitis ŝin refoje ĵaŭdon, kiam Sofia diris, ke ŝi ree renkontis sian iaman samĉambrulon. Mi bezonis vidi Nadjan, ĉar mi malkontentis pri Sofia. Mi ne komprenis tion tuj. Nur mi sentis fortegan deziron revidi Nadjan. Necesis tempo, por

ke mi komprenu, ke tiu deziro rilatas al la fakto, ke por unu vespero Sofia ŝajne pli deziras Jankarlon. Jankarlo, tio estas la knabo kun kiu ŝi estis antaŭe, ĉu mi jam diris lian nomon al vi? Mi ne memoras. Fakte, mi celis kuŝi kun Nadja. Estis vere infaneca reago: "Sofia iras al Jankarlo, mi iros al Nadja kaj havigos al mi plezuron kun ŝi." Kia homo mi estas! Ne tre bele, ĉu? Mi pretas uzi homon kiel ilon, sen zorgi pri la sekvoj por tiu, aŭ por la alia. Nun, kiam mi diras tion, mi vidas la aferon multe pli klare. Mi ne sciis ke mi povas agi tiel senrigarde al aliulaj sentoj! Grave! Mi ne ŝatas, kion mi ekvidas pri mi. Ne tiel mi igos Sofian feliĉa, kaj min kun ŝi. (Ĉu vi bone aŭdis? Mi diris: kun ŝi, ne per ŝi aŭ pro ŝi. Kun ŝi, nur kun ŝi mi volas feliĉi.) Unuafoje en mia vivo mi amas kaj amo ne estas ludo. Estas io vera. Kiam mi trovas, ke ŝi agas malĝuste - ekzemple pri tiu fakto ne havi la forton forpreni sin el la rilato kun Jankarlo - mi diras mian opinion al ŝi, eĉ se mi scias, ke tio ne plaĉos. Kaj ŝi dankis min! Por mi, tio estas nekredbla. Antaŭe mi ĉiam pensis ke, por ke oni amu min, mi devas ne malplaĉi, aŭ neniam diri ion kion la knabino ne ŝatos. Ŝi ne ŝatis, kiam mi eldiris mian opinion pri ŝia ne-malligebla ligo kun Jankarlo, sed ŝi akceptis ĝin, kaj dankis al mi. Mi ŝanĝiĝas. Estas mirige rimarki, ke oni fariĝas alia, eĉ se ege malrapide, eĉ se nur iom post iom. Jes, estas mirige. Kaj ege feliĉige.

Ĉu mi diris al vi ke mi estas feliĉa? Neniam antaŭe mi estis tiel feliĉa en rilato kun virino. Mi ĉiam estis knabeto, infaneto, kiu timis la reagon de la virino, kvazaŭ ŝi estus timinda patrino. Nun ne plu. Sofia estas tiu kiu rigardas al mi kiel al iu forta kaj alta. KREDU min, tio estas ege nova por mi, eĉ se tio aperas natura al la plimulto el la knaboj. Vi scias, estas ege plaĉe senti, ke oni antaŭen-iras. Mi ĝenerale havis tute alian senton, nome, ke tagoj forflugas unu post la alia, kaj mi restas samloke. Estis io senesperiga en tiu sento. Kia plezuro rimarki, ke la vivo ŝanĝiĝas! Mirige, mi sentas dankemon al la tuta mondo. Tamen mi scias, ke la tuta mondo tute ne zorgas pri mi, kaj tute ne rilatas al mia nuna feliĉo. Sed tiel mi sentas...

Io alia estas miriga en mi: mi ne scias kiam mi povos pagi vin, ĉar Sofia kostas al mi multon. Kaj tamen mi sentas min tute libera. Mi dankas vin pro via helpo iĝi pli feliĉa, sed mi ne sentas devon pagi vin. Vere, mi liberiĝas. Kiu antaŭe kredus, ke mi povus tiel libere rilati al mono, kiun pagi necesas?

* * * * *

Ne ĉiu psikanaliza renkonto estas same bela kaj sunplena, kiel ĉi tiu. Fojfoje estas tre malsimple, aŭ plene je malamo, ankaŭ al la psik-analizisto. Mi ŝatus scii, kara leganto, se tia raportado interesas vin. Mi povus prezenti pliajn psik-analizajn raportojn al vi. Vi tiel vidus kiel malsimilaj homoj estas inter si, kaj samtempe, ankaŭ, kiel similaj. Por mi estas tre facile pretigi tian legaĵon, ĉar mi rimarkis ke en tiu tre speciala situacio de psik-analizo (aŭ aliaj formoj de psik-helpado, pri kiuj mi same bone povus paroli), la homoj ĝenerale uzas tre simplajn vortojn, plej ĉiutagajn, eĉ por esprimi vere gravajn travivaĵojn. Tion eble kaŭzas la fakto, ke en tiu situacio oni iomete revenas al pli infaneca estmaniero. Mirige, per tiu reinfaniĝo oni fariĝas vera plenkreskulo: oni prilaboras siajn problemojn, siajn travivaĵojn, ankaŭ siajn memorojn

pri delonge forfluginta tempo, per pensaj kaj sentaj iloj same simplaj, kiel tiuj de infano, kaj oni tiel kaptas ilian signifon pli bone. La sekvo estas, ke oni pro tiu nova kompren- aŭ sentmaniero, reorganizas sin al personeco, kiu funkcii pli bone. Nu, ne gravas la kaŭzo, gravas la fakto ke en tiu situacio homoj parolas pri ĉio per tre simplaj vortoj. Ne malfacilas al mi esperantigi tiun aŭ alian parton de tiuj parolhoroj, kiuj prezentigas ĉe mi. Ĉu interesas vin aŭ ĉu por vi legi ion similan estus pura tempoperdo?

Letero, sed el kie?

“Nekredeble, mi sukcesis,” li pensis.

La laboro estis pli malfacila ol ĝenerale, kaj en lia nuna situacio... Por sukcese starigi kaj funkciigi la maŝinaron, kiel li ĵus faris, necesas povi pensi, zorge rigardi ĉion vidindan, uzi la manojn ĝustamove, unuvorte agi kiel vera teknika fakulo, sen lasi la pensojn flugi for el la laboro. Kaj kiel fari ĉion ĉi, kiam oni nur povas pensi pri ŝi, pri la fakto, ke ŝi ĵus... ?

(La ĝustan vorton li ne povis diri al si, eĉ neaŭdeble, eĉ nur pense.)

Li rigardis ĉirkaŭ si. La hotelĉambro aspektis malriĉe, ĝi estis malvasta, enhavis nur la plej necesajn meblojn, eĉ ne komfortan brakseĝon. Al teknikisto oni ne pagas luksajn hotelojn, kaj cetere, en ĉi tiu forperdita loko, luksa hotelo simple ne ekzistas. Feliĉe, estis almenaŭ tablo kaj seĝo.

"Mi skribos al ŝi leteron", li informis la senhoman ĉambron, kaj pro la sono de tiuj vortoj li tuj sentis sin iom pli bone. La ŝanĝon en si li rimarkis, kaj komprenis. "Oni malpli solas, se iu parolas," li diris, kaj sentis infanan kontenton pri la sono de tiu diraĵo, kiun li ripetis al si en pli simpla formo, pli malpli kante kiel farus knabeto: "Malpli solas, se parolas. Malpli solas, se parolas. Malpli solas, se parolas..."

Sur la tablo kuŝis papero, leterpapero, kiun la hotelo havigas al tiuj, kiuj tranoktas en ĝi. Li komencis skribi:

"Kara Eva,

"Tiu ĉi lando estas tre bela, sed mi ankoraŭ ne havis la tempon vidi multon el ĝi. Vi scias, ke mi venis por enlokigi niajn maŝinojn, sed vi ne povas scii, kiel malfacile tio estis ĉi-foje. Estas nekredeble. Tiuj homoj opinias, ke oni povas fari ion ajn. Ke sufiĉas voli, decidi, por ke la afero iĝu farebla. Ili volis meti la maŝinojn en lokon, kie tio ne eblis. Estis tre malfacile komprenigi al ili, ke ne temas pri bonvolo aŭ

malbonvolo. Sed ke faktoj estas faktoj. Se maŝino estas tiom granda, kaj la loko por ĝi tiom malgranda, ne eblas ĝin starigi tie.

"Sed mi ne perdigu vian tempon per sencela parolado pri miaj teknikistaj problemoj. Io pli grava dirindas, nome, ke mi amas vin, kaj ĉiam pensas pri vi. Mi volus, ke vi estu apud mi, por ke ni povu interŝanĝi ideojn kaj opiniojn pri ĉio, kion mi vidas aŭ ekkonas ĉi tie. La manĝoj, ekzemple, estas tre bonaj, tre malsamaj ol ĉio, kion mi provis aliloke, aŭ kio estas ordinara ĉe ni..."

La vortoj venis facile, la skribilo flugis sur la papero. Eĉ nur letere, la kontakto kun ŝi ĉiam estis tiel natura, senproblema!

Dum li skribis, rideto formiĝis sur lia vizaĝo, kaj tie restadis ĝis li finis la leteron. La unua rideto, ekde kiam ŝi...

Li skribis la hejman adreson sur la koverto, kaj pretigis sin por la nokta kuŝado. Rapide li endormiĝis, kun brila rideto survizaĝe: nur la dua rideto, fakte, depost...

Tiel li komencis. Kaj tiu letterskribado fariĝis regula. Io ordinara. Io, kio helpis vivi. Li skribis al ŝi eĉ hejme. Leteri, kiam oni troviĝas sola alilande, en seninteresa urbo, en seninteresa hotelo, tio estis natura: kontakto kun iu, kiu, eĉ se malproksima, pense revenas apuden. Dum multaj jaroj post la edziĝo, li tion faradis, kiam lia teknikista laboro irigis lin al fora lando, kio okazis relative ofte.

Sed sidi hejme kaj tamen skribi leteron al ŝi... Al ŝi, kiu... kiu ne plu estas ĉi tie. Nek aliloke. Almenaŭ sur ĉi tiu tero, ĉar, kiu scias, kio okazas post... post kiam oni kuŝas senmova, senviva. (Eĉ kiam tiuj pensoj envenis lin - li ja sciis, ke li agas neordinare, kaj fojfoje li pripensis sian mirigan agmanieron - eĉ tiam la ĝusta vorto ne akcepteblis.)

La letero, kies komenco prezentiĝis ĉi-supre, estis la unua, kiun li skribis post ŝia malapero el inter la vivuloj. La poŝto venigis ĝin al lia adreso, kaj li do trovis ĝin hejme, kiam li revenis. Li ne malfermis ĝin, ĝin ne relegis. Li nur metis ĝin en ujon, ie, en parto de la loĝejo, kien li ne ofte iras. Kaj li forgesis pri ĝi.

Post kelkaj semajnoj, okazis en la laborejo io, kion li sentis bezonon preparoli kun ŝi. Tiun vesperon, sen plene scii, kion li faras, li prenis paperon kaj komencis skribi al ŝi, kiel li faris en fora lando, ĉiufoje, kiam io rakontinda okazis. Li skribis sur ĝi la adreson de la hejmo, en kiu li mem sidis. Kaj iris meti la leteron en la ujon, kun la unua, tiu, kiun la poŝto alportis.

Li tiom amis ŝin! Kiu povus kompreni? Tuta vivo kun homo, kiun oni amas, vere amas, kun kiu ĉio estas facila kaj natura, kiu igas la vivon bela. Kaj jen ŝi... Aŭto, kiu iras tro rapide. Juna viro, kiu ne regas sian veturilon. Kaj jardekoj da eblaj plu-amado,

da plua feliĉiga kunvivado, da tio, kion la vivo normale havigas al homoj ankoraŭ junaj, malaperas for. Fino. Porĉiame...

La vivo perdas signifon. La suno fariĝas senbrila. Naturo senkoloriĝas. Ĉio, kio ŝajnis simpla kaj ordinara, sentiĝas maldolĉa nun. Soleco!

“Persono, kiu ĉiam estis sola, ne scias, kio estas soleco,” li pensis, eble ne ĝuste. Sed havi, kaj poste perdi kaj senti la mankon...

Skribi leterojn helpis. Anstataŭ interparoli kun iu apuda, li tiel sciigis al iu fora siajn ideojn kaj spertojn. Li ne plu estis plene sola. Li preskaŭ povus reuzi la vortojn de tiu unua tago, kiam, kvankam konscia pri ŝia definitiva foresto, li tamen skribis al ŝi:

“Nekredeble! Mi sukcesis!”

Ĉi-vespere temis pri aparte malfacila labortago. Li longe priskribis ĉiujn travivaĵojn en speciale bela, amplena letero al ŝi. Sed li tiom laboris tuttage, post neordinare frua vekiĝo, ke nun lin kaptis forta emo dormi. Li relegis la leteron kaj trovis ĝin bona. Li pensis: “Ĝi plezurigos ŝin”. Sed dum li relegis, li devis ege kolekti siajn fortojn por kontraŭstari dormemon pli kaj pli malfacile supereblan. Li restis tie, side, dum kelkaj minutoj, ne tute maldorma, ne tute endorma. Post longeta tempo, li rimarkis, ke, sen vere scii, kion li faras, eĉ sen rigardi, li ĵus prenis skribilon kaj almetis ion sur la leteron. Per la tuta forto de sia volpovo, li eligis sin el la duondormo kaj turnis la rigardon al la vortoj ĵus skribitaj.

“Ne. Ne eble. Ĉu vere...?”

Estis tiel nekredeble, ke li decidis atendi la morgaŭon por certigi sin kaj pripensi la aferon. Li iris al sia lito.

Fakte, nur kelkaj vortoj rigardis al li de sur la papero. Sed kio mirigis, tio estis malpli ilia signifo ol la skribo, kiu ilin formis: estis klare ŝia skribmaniero, tute malsama ol lia. Kaj ĝi diris:

"Dankon. Mi ricevas. Skribu plu. Mi kisas vin. Eva."

La dikulino

Ŝi estis vere tre dika. Fakte, ŝi estis ankaŭ alta kaj larĝa, sed tion oni malpli rimarkis. Kio tuj okulfrapis, tio estis la dikeco. Jam antaŭ la kurs-komenco ĉiuj subrigardis ŝin mire, jen kun malŝato, jen kun superula rideto, jen kun tuja signifplena okulkontakto kun iu alia. Ankaŭ timete. *"En kian mondon mi enmetis min?"*, ĉiu

demandis al si. Neniu rimarkis la dek aliajn lernantojn, kiuj aperis tute ordinaraj. Nur tiun dikegan virinon ili vidis, kun ia besta timeto en si: eta besto ĉiam sentas timon antaŭ bestego, kaj rilate al ĉi tiu lernantino, ĉiu homo povis senti sin nur besto malgranda. *"Mi ne estas certa, ĉu mi restos en ĉi tiu kurso,"* ĉiu pensis, rigardante la egulinon, *"oni jam diris al mi antaŭe, ke por lerni tiun Esperanton oni devas esti pli malpli... mensmalsana... iom stranga... Kaj tiu grandega ulino vere elstaras kiel iu... kiel iu... ne tute homa. Nenormala. Kion mi faras en ĉi tiu grupo?"*

Gajtano, la instruanto, iom malfruis. Kiam li eniris la klasĉambron por tiu unua leciono, jam atendis dek unu homoj. Vidante ŝin li ekhaltis, kaj nur povis stari senmova dum minuto, mire rigardante. Ĝenerale bona, akceptema homo, li ekhavis reagon tute neordinaran. Li pensis ne: "Kiu estas tiu?", sed: "Kio estas tio?" Sian reagon li tuj rimarkis malŝate, nekontente pri si - li ja provis ĉiam agi homame, respkete, tolereme - sed tia ĝi estis: li trovis malfacile akceptebla la ĉeeston, inter la lernantoj, de tiu alta, larĝa, dika persono. Jes, jam en tiu unua leciono, neniu sentis sin tute hejme en la kurso, pro ŝi.

Sed en homo malantaŭ videblaj ecoj kaŝiĝas pli multe da nevideblaj, kaj ĉi-lastaj estas la plej gravaj. Tial la reagoj ĉi-supre raportitaj okazis nur komence. Jam je la tria renkontiĝo, ĉiuj ŝatis Adelan. Ili komencis vidi, tra la dikeco, la bonecon de ŝia vera esto. Kaj pli kaj pli ili rimarkis, ke ŝi, iel, estas bela. Kiam bestetoj ne plu timas, ili vidas bestegon alimaniere: timo agas kaŝe al la vero, ĝi malhelpas vidi ion, kia ĝi estas.

Adela montriĝis plej aminda virino. Ŝia donemo, komprenemo, ridemo plaĉis al ĉiuj. Ŝi estis simpla: iu, kun kiu rilati ĉiam estas facile. Ŝi neniam rigardis iun de supre, aŭ diris ion malveran. Ŝi montris sin tia, kia ŝi estas, kaj ŝi ĉiam pretis helpi. Ŝi ŝategis manĝi - pri tio neniu miris - sed ŝi pensis pri la aliaj tiom, kiom pri si mem: ĉiusemajne ŝi disdonis dolĉaĵojn al la kunlernantoj. La lingvon ŝi lernis rimarkinde rapide, kaj kun la simpleco de natura instruisto ŝi helpis ĉiun kompreni la plej malfacilajn aferojn. Ŝi iĝis bonvena helpanto al Gajtano, kiu pli kaj pli altlokis ŝin en sia homklasado.

Leciono sekvis lecionon, monato monaton, ĝis la kurso alvenis al la lasta instruhoro. Post kiam tiu finiĝis, Adela invitis ĉiujn al sia hejmo, kiu troviĝis tuj apude. Multegon bonan por manĝi kaj trinki ŝi antaŭe preparis: lastan lecionon oni festu, kaj festo ne estus festo sen la plezuro, kiun nur kunaj manĝado kaj trinkado povas doni. La kursanoj estis ege kontentaj. Ridoj traflugis la ĉambron, kaj ĉiuj partoprenis en la interparolo - en la lingvo internacia! - kun scivolo kaj intereso.

"Kial vi decidis lerni Esperanton?" demandis Eriko, la plej juna el la lernantoj. Adela tuj respondis:

"Ĉar estis la sola kurso, kiun mi povis ĉeesti, rilate al tago kaj horo."

"Kion? Ĉu vi venis nur, ĉar la kurso okazas merkrede je la 18-a?"

"Jes, nur tial. Kaj ĉar ĝi okazas en la apuda konstruaĵo. Mi povas diri ion al vi: mi tute ne sciis, kio estas Esperanto, antaŭ la unua leciono. Mi eĉ ne sciis, ke ĝi estas lingvo."

"Sed kial, se vi nenion sciis pri ĝi, vi volis sekvi kurson?"

"Ĉar mi volis renkonti homojn. Mia problemo estas soleco, manko de amo. Komprenu min! Tuj kiam mi enamiĝas al iu, tiu volas, ke mi maldikiĝu. Se la rilato fariĝas pli proksima, la alia komencas agi instrueme al mi. Li klarigas, kion mi manĝu, kaj kiel, aŭ kiom mi sportu, kaj kial: por maldikiĝi. Kelkfoje ili diras: por refariĝi homa. Kiel mi povus plu ami iun, kiu ne akceptas min? Iun, kiu vidas min nehoma?"

Ŝi ekploris. Nur la plorojn oni tiam aŭdis, kaj la ĝenerala senparoleco sentiĝis malfacile elportebla. Neniu sciis, kiel respondi al ŝi. Ĉiuj dezirus montri sian amikecon, meti iom da dolĉo en ŝin, helpi ŝin retrovi pacon, sed ili ne vidis, kiel eblus tion sukcese fari.

Kaj jen ŝi rompis la malplaĉan situacion en maniero, kiun neniu atendis: ŝi ekridis. Ion similan ili ofte vidis dum la kurso: ŝi povas transiri de malfeliĉo al feliĉo en nur unu minuteto. La ege sonora rido igis ĉiujn kunridi, eĉ se neniu tre bone sciis, kial. Iom post iom, ŝia ridado transformiĝis al simpla rideto, dum ŝi ĉirkaŭrigardis ilin, kaj ŝi rekomencis paroli:

"Estis bonega ideo sekvi ĉi tiun kurson. Vi ĉiuj rilatis al mi plejplej amike. La problemo pri vera amo plu daŭras, kompreneble, sed mi sentis, ke vi akceptas min tia, kia mi estas. Jam tio estas multego. Kaj pri la amproblemo mi nun havas esperon."

"Ĉu vere?" demandis junulino, kun nekaŝeblaj miro kaj scivolo.

"Jes, mi komencis esperi, kiam Gajtano parolis al ni pri la diversaj uzebloj de Esperanto. Ĉu vi memoras, kiel li klarigis pri la tutmonda koresponda servo? Kiam mi revenis hejmen post tiu leciono, mi tuj skribis al ĝi, kaj sendis mian peton dirante: mi ŝatus viran leter-amikon, kiu sentas en si la povon ami virinon ege grandan kaj dikan, plenan je plezuro kiam ŝi manĝas, kaj tute ne pretan seniĝi je tiu plezuro; nur akcepteblas viro, kiu neniam petos ŝin maldikiĝi."

"Kaj ĉu iuj kontaktis vin?"

"Jes. Kiam mi serĉis similm metode nialande, mi neniam sukcesis. Sed ŝajnas, ke eksterlandanoj havas alian manieron rigardi homan dikecon. Mi jam ricevis dekduon da respondoj. Kelkaj ne estas uzindaj. Ekzemple skribis bulgaro, kiu tuj volas edziĝi al mi, sed mi estas certa, ke tio estas por li nur maniero povi vivi ĉi tie, sen problemo pri restadpermeso. Mia personeco tute ne interesas lin. Alia estas knab-ama viro, al

kiu, pro kialoj al mi ne tre klaraj, surpapera edzeco ege utilis. Sed en diversaj leteroj mi antaŭsentis veran deziron rilati kun mi. Unu eĉ diris, ke li tuj sentis en mia unua letero la brilon de mia personeco, kaj ke miaj pensoj pri la funkcio de manĝado en la vivo estis por li suno en vintra malbrila ĉielo. Haha! Eble mi ne tuj sukcesos ŝanĝi mian deziron en realon, sed mi havas esperon nun!"

*

Ses monatojn poste, Adela kunvenigis la kursanojn kaj prezentis al ili etan maldikulon, kies okuloj brilis ame, ĉiufoje, kiam li rigardis ŝin, kio preskaŭ tuttempe okazis. Tiu alilandano aperis iom infaneca, sed kial tio gravus? Li videble estis ege kontenta. Ŝi rilatis al li patrine, kun simila plejsupra kontenteco... Rigardi ilian feliĉon estis kvazaŭ ricevi de la Ĉielo donacon ame preparitan, tiom ĝi brile radiis.

La sama disradiado de feliĉaj sentoj reokazis kelkajn semajnojn poste, kiam alvenis la tago de ilia geedziĝo. La internacia kuniĝo de du esperanto-uzantoj estis la temo de multaj interparoloj en tiu urbeto, kie malofte okazis io speciala. La lokaj gazetoj sukcesis transdoni la senton pri feliĉo al sia legantaro, belvorte rakontante pri la tuta afero kaj, kompreneble, pri la fakto, ke Adela trovis sian edzon dank'al Esperanto. La artikolojn beligis fotoj pri la du, kies mirinde brilaj ridetoj plifortigis la ĝeneralan feliĉ-senton.

*

Pasis jaro. Revenis la tempo de Esperanto-kurso por komencantoj. Preta komenci la unuan lecionon, Gajtano eniris la lernejon, supreniris al la klasĉambro, malfermis la pordon kaj... ekhaltis, pro troa miro. Dum tuta minuto li staris tie, povanta nek moviĝi nek pensi. Ektimo kaptis lin. Li havis la senton, ke oni manĝas lin rigarde. Li estis la celo de kvardek ege brilaj okuloj. Dudek dikulinoj lin atendis, esperplene.

Redonu al mi forprenitajn jarojn!

Mi jam sciis multon pri mi, multon malfacile akcepteblan. Ekzemple, mi sciis, ke miaj gepatroj ne estas miaj gepatroj. Ili akceptis min kiel sian filinon, sed mi ne estas ilia filino: ili adoptis min. Ili estas bonaj svisoj, sed mi naskiĝis kaj travivis la unuajn jarojn de mia vivo en Kolombio, en tiel malaminda ĉirkaŭaĵo, ke... Ne. Ne eblas priskribi tion al vi, kiuj vivas en lando, kie eĉ la hundoj aperas riĉaj. Esti malriĉa estas nenio, rilate al tio, kion mi spertis. Malriĉulo estas homo, kiu havas malmulton. Mi havis malpli ol tion: mi estis senhava. Eta mi estis, kiam miaj nunaj gepatroj "aĉetis" min. Jes, tiun vivoŝanĝon mi sentis kiel aĉeton fare de ili. Sed mi klare memoras, kiel

mi vivis antaŭe. Ho jes, mi memoras. Ekzistas travivaĵoj, kiujn ne eblas forgesi. Sed pardonu, se mi preferas ne paroli pri tiu tempo. Nur pensi pri ĝi min tro malĝojigas.

Mi scias krome, ke mia frato ne estas mia frato. Li venas el Bolivio. Oni lin "vendis" al miaj gepatroj pli malpli samtempe. Videblis, ke ni havas la saman aĝon. Miaj gepatroj opiniis, ke tiel estos pli facile. Se ni samaĝas, ni ludos la samajn ludojn. Neniu el ni estos sola: li aŭ ŝi ĉiam havos kunludanton similan al ŝi aŭ li. Kaj kiam ni vizitados lernejon, ni iros kune kaj sidos en la sama klaso. Tiel pensis la adoptaj gepatroj: tiuj infanoj antaŭe vivis, kiel dombestoj, kiujn oni forsendis morten for el la domo, senfamilie, sen amo, en plenan solecon. Kunesti kun similulo helpas ilin pli facile akcepti la novan vivon, kaj ili estos pli feliĉaj.

Kaj nun ĉio disfalis.

Ne, ne. Ne pro mia frato. Li plu vivas kun ni. Kaj li ne starigas specialajn problemojn. Li estas knabo, agas knabe, volas montri, ke li estas pli forta ol mi. Fakte mi estas pli forta, sed al mi estas negrave, se li superas min. Mi do lasas lin superi en ludoj. Tiam li vidas sin grandulo. Viro. Kiel ridindaj estas knaboj! Multon mi faras pli bone ol li, sed tion mi ne montras. Se feliĉigas lin kredi sin supera, kial mi kontraŭu? Ne estas laŭ mia intereso. Mi travivis tro da malfacilaĵoj en mia antaŭa vivo. Nun, kiam mi vivas en riĉeco - eĉ se miaj gepatroj tion ne scias pri si - mi ne metu al mi pli da malfacilaĵoj ol necesas. La vivo ĉiaokaze jam estas sufiĉe malsimpla.

Se ĉion kunrigardi, rilate al multaj knaboj, mia frato estas tute akceptebla. Mi ne lasas lin frapi min forte. Nur iomete, por ke li kontentu. Inter ni do ne estas multaj problemoj. Iel, la vivo instruis al mi la arton pensi ĝuste laŭ miaj intereso. Mi scias, kiel paroli al li, kaj al patrino, kaj al patro. Kaj al la instruistino.

Ni estas en la tria klaso. Niaj samklasanoj aĝas ĝenerale ok jarojn. Pablo kaj mi estas, onidire, naŭjaraj. Sed ni sentas nin bone kun ili. Ni ja vivis en plej timigaj lokoj, jen en soleco aŭ preskaŭ-soleco, jen meze de malbonuloj, kiajn vi ne povas bildigi al vi. Eĉ se sidi la tutan tagon ĉe libroj, skribiloj kaj papero ne estas vivo plej plezuriga, tamen, al la tiama libera vivo mi preferas la ĉi-tiean ĉiutagan restadon en la lernejo. Libereco ne estas libereco, se vi ĉiam malsatas, soifas, timas, sentas vin malbone.

Sed nun, ĉu mi povos reiri al tiu klaso? Nun, post kiam mia vivo dispeciĝis...

Ne temas pri la rilato kun miaj gepatroj. Ili estas tute akcepteblaj. Eĉ amebaj. Mi ne povas diri, ke ili komprenas ĉion, sed tion oni ne atendu de plenkreskulo. Ili pensas pri si: "Kiel bonaj ni estas, ke ni adoptis tiujn du geknabojn!" Ili eligis nin el senflorojo por doni vivon al ni. Ili preskaŭ kredigus, ke nur dank'al ili la naturo belas. Jes ja, post nia antaŭa vivo, senflora kaj en-kore sensuna, la nuna montriĝas multrilate kolora, plej feliĉige. Tamen, ili estas iom ridindaj. Tiom videblas, ke ili atendas dankemon! Bone, bone. Mi lernis agi laŭ miaj intereso, kaj mi donas al ili la

dankemon, kiun ili esperas ricevi. Ili do kontentas, kaj agas ankoraŭ pli ame-varme, pli doneme al mi. Kaj ankaŭ al Pablo, mia frato, eĉ se li montras sin malpli danka.

Komprenu bone: ni estas la infanoj, kiujn ili ne povis havi. Mi ne scias, ĉu patro ne havas ĉion viran, aŭ ĉu al patrino io mankas. Negrave. Sed mi aŭdis ilin diri tion al amikaj geedzoj, kiuj foje venis vespermanĝi niahejme. Ili ne sciis, ke mi aŭskultas. Ni do estas la aĉeto, kiu rebonigas la malbelajn agojn de Sinjorino Naturo. Tial nia valoro estas nekalkulebla. Ni eĉ komencas iom simili ilin. Jaroj da kunvivado formas komunecon, kiu finfine vidiĝas. Al homoj, kiuj renkontas la tutan familion kune, ne venas la ideo, ke nin naskis foruloj. Tion la gepatroj alte ŝatas: oni rigardas ilin naskopovaj, kaj do senmankaj viro kaj virino. Dank'al ni ili rericervis sian tutecon.

Kompreneble, nun, tio ŝanĝiĝos. Nun, post kiam nin frapis tiu informo...

Jes, estas ege malfacile por mi, tiel malfacile, ke mi min demandas, kiel mi sukcesos plu vivi. Sed eble ankaŭ por patro kaj patrino estas frapo nesuperebla. Ĉiuj homoj, kiuj kredis, ke ni estas iliaj gefiloj, nun scios la veron. Min igas malfeliĉa pensi, kiel senesperige estos por ili. Ilin mi ja amas. Pli malpli.

La afero komenciĝis jene. Ekdoloris la ventro. Poste sango venis. Unue patrino diris, ke estas nenio. Sed ŝi montris sin zorgoplena. Finfine ni iris al doktoro. Li diris: "Naŭjara, ĉu? Nialande, tio estus vere frue, sed se vi diras, ke ŝi estas latinamerika..." Tiel parolis la infandoktoro. Sed la postan monaton, kiam la samo okazis, mia patrino iris kun mi al virindoktorino. Ŝi simile respondis, sed ŝi donis la adreson de tria doktoro. Fakulo. Mi ne memoras, kiel oni nomas tiun fakon. Longa vorto por mi sensignifa. Io pri kresko, verŝajne.

Tiu plej faka fakulo rigardis min laŭ ĉiuj flankoj. Li faris provon pri tio kaj tio ĉi. Li kalkulis, kiom mi grandas tiudirekte, kaj ĉi-direkte, kaj alidirekte. Li rigardis, kio estas dika, kio maldika. Kaj kiom. Li faris al mia patrino multegajn demandojn. Li kalkulis kaj rekalkulis. Kaj jen li iris:

- Ne estas eĉ plej eta malcerto: ŝi estas dekdujara.

Dekdujara! Mi! La vortoj de la doktoro falis sur min kiel mortiga frapo kaj turnis miajn sentojn dise al ĉiuj direktoj. Ĉio ene de mi ekestis malvarma. Mi sentis, ke oni prenis mian vivon, kaj sub mia rigardo tranĉis ĝin al mil etaj pecoj. Mi ne plu estis la persono, kiun mi konis. Mi ne plu estis mi.

Mia patrino estis ege malkontenta, ke li diris tion dum mi ĉeestis. Mi aŭdis ŝin diri tion poste al patro. Sed kion fari? La diro estis dirita.

Kaj el mia vivo, el miaj ideoj pri mi, restis nenio. Mi estis iu alia.

Dekdujara! Sed se neniu rimarkis tion antaŭe, ĉu vi prezentas al vi, kion tio signifas? Kiom malproksima mi estas, ĉiurilate, de miaj samaĝuloj! Ne mirige, ke mi estas iom pli forta ol mia frato! Sed mi ne tre brilas lerneje. Pensu, al kio nin venigas tiu rimarko: kian menson mi havas, kiel mi funkcias en la kapo, por ke pluraj etuloj naŭjaraj sukcesu pli bone ol dekdujara mi?

Mian aĝon oni neniam sciis. Mi estas trovita knabino. Mi scias nenion pri miaj veraj gepatroj, nur, ke ili forlasis min. Mi ne malamas ilin. Eble, ili tion ne volis, sed okazis io nesuperebla. Mi ŝatus scii. Mi ŝatus foje vojaĝi tien kaj demandi. Sed mi scias, ke mi neniam sukcesos. Neniu memoras, neniu zorgas. Kiel mi retrovus iun kun kredebla informo, kiam ekzistas miloj da infanoj kiel Pablo kaj mi? Sed mi tiom ŝatus vidi foton de mia vera patrino. Scii, kie kaj kiam mi naskiĝis. Povi legi mian horoskopon, kiel ĉiuj aliaj (mi havas naskiĝdaton, sed mi scias, ke ĝi ne estas vera, ĝi estis elpensita nur por la paperoj ; oni ja ne povas vivi ĉi tie sen naskiĝdato). Aŭ, se ne ĉion ĉi, eble tamen sur kiu strato de kiu urbo oni komence trovis min...

Mi scias, kial mi lasas la pensojn devojiĝi tiadirekte: ĉar mi ne povas preni sur min la veron. Akcepti ĝin. Pensi pri ĝi. Hieraŭ mi estis sufiĉe feliĉa knabino, naŭjara. Kaj mi nun devas porti dekdu jarojn da jam-vivo!

Kiu redonos la tri jarojn, kiujn en unu minuto oni deprenis de mi?

Ne moviĝu

Tiutempe ni vivis en Madagaskaro. Mi estis naŭjara kaj Ivo, mia frato, du jarojn pli juna ol mi. Post somero en Svislando, ĉe familianoj, ni ekflugis hejmen. Neniu hejmano aŭ amiko venis kun ni. Okupiĝis pri ni iu stevardino.

Je la dua horo nokte la aviadilo alteriĝis en Ĝibutio. Nia stevardino kuniris kun ni, en la flughaveno, ĝis iu granda ejo kun multaj tabloj kaj seĝoj. Ŝi sidigis nin, duondormajn, ĉe tablo, alport-is trinkaĵojn kaj diris: "Ne moviĝu de ĉi tie, ĝis mi revenos. Ne moviĝu!"

Ŝi parolis tre forte, eble ĉar ŝi opiniis, ke, preskaŭ dormantaj, ni riskus ne kompreni ŝin. Ŝi ripetis plurfoje tiujn samajn vortojn, antaŭ ol foriri.

La trinko baldaŭ estis for, sed ne la atendo. Ĉiu minuto daŭris tre longe. Ni ne sentis deziron interparoli aŭ ludi, kaj nenio speciala okazis tiuloke.

Fine tamen la esperataj vortoj sonis en la tuta flug-haveno: "La vojaĝantoj al Antananarivo per flugo AF 177 bonvolu tuj iri al elirpordo numero 3."

"Ni baldaŭ reforflugos," mi diris al Ivo. Responde, li senvorte ridetis.

La stevardino ŝajne malfruis, sed kion fari? Post plua iom longa atendado, en ĉiuj partoj de la flughaveno aŭdeblis nova laŭtparolila anonco, plej plezurige por ni: "Lasta alparolo por la vojaĝantoj al Antananarivo. La vojaĝantoj de flugo AF 177 bonvolu tuj iri al pordo numero 3."

Krom ni, restis nur du personoj en la trinkejo. Ili ekstaris kaj iris for.

Nia soleco igis la lokon ege granda. Ni sentis nin tute etaj, perditaj en ĝi.

"Ĉu ni devus ekiri?" demandis la frateto, time.

Ankaŭ mi komencis timi, sed mi respondis:

"La stevardino diris: 'ne moviĝu, mi revenos por vi'. Verŝajne nur post la aliaj ni eniros la aviadilon."

Ĉi tiun ni vidis. Tra la grandega fenestro la tuta deflugejo estis bone videbla.

La ne-veno de la stevardino igis min pli kaj pli zorgoplena. Ni ja vidis aŭtobuson alveni, la vojaĝantojn eniri en ĝin. Estis niaj kunuloj: plurajn ni rekonis.

La aŭtobuso ekveturis. Ĝi malproksimiĝis, direkte al la aviadilo. Kun ĝi foriris nia ridetemo.

"Nur ni restas ĉi tie, ni estas tute solaj," Ivo diris, post ĉirkaŭrigardo.

Tamen infano devas fari, kion plenkreskulo diris, ĉu ne? La stevardino parolis kiel ĉefo, certa pri sia estreco. "Ne moviĝu!" estis ŝiaj vortoj, tute klaraj: ni eble povis moviĝi surloke, sed tute certe ne eltrinkejiĝi.

Ni vidis la vojaĝantojn eliri el la aŭtobuso, sekvi unu la alian sur la movebla ŝtuparo, eniri la aviadilon. Ni rigardis per larĝe malfermitaj okuloj, demandplenaj. La aviadilaj pordoj fermiĝis, la movebla ŝtuparo forlasis sian lokon, ekiris revene. La aviadilo komencis moviĝi antaŭen.

"Io estas neĝusta," Ivo diris plorete.

Mi sentis min malbone. Respondeca. Pli-aĝaj fratoj ĉiam sentas sin respondecaj. Gepatroj ne sufiĉe pensas, kiom malfacila, zorgiga, problemfara tiu sento de respondeco estas por ni etuloj, tiel senfortaj. Ankaŭ mi emis plori, sed mi malvolis montri min plorema al la frateto. Kion li opinius pri mi? Kaj mia plorado nur kreskigus lian timon.

Kaj jen mi ekpensis pri io grava: niaj pasportoj, niaj aferoj, ĉio nia restis en la aviadilo, trans tiu nun fermita pordo. Kaptis min zorgego. Se ni devos tranokti ĉi tie, eĉ niajn amatajn ludilojn ni ne havos kun ni. Krome mi sciis, ke survoje al Antananarivo aviadiloj alteriĝas en Ĝibution nur dufoje semajne. Tri tagojn do ni devos resti sen mono, sen aliaj vestoj, sen io. Ĉe tiu penso mi eksentis min tute malvarma. Mi iĝis senviva, pala, sen povo pensi plu. Mi rigardis Ivon, kontenta, ke lia rigardo direktiĝas ne al mi, sed al la transfenestra nokto. Ne plaĉus, se li rimarkus mian malesperon.

Kaj jen eniris la ejon flughavena oficisto. Kun granda miro li ekvidis nin.

"Kion vi faras ĉi tie?" li demandis.

"Ni atendas. La stevardino, kiu zorgas pri ni, diris: ne moviĝu, mi revenos por vi."

"Kien do vi devas iri?"

"Al Madagaskaro."

"Madagaskaro! Sed la aviadilo..." Li rigardis trafenestre. Vidi lin sufiĉis. Ni ne bezonis vortojn por kom-preni, kiel ĝusta estis nia timo.

"Ne moviĝu!" ankaŭ li diris, antaŭ ol malaperi. Kial ĝuste tiujn vortojn? Ili kunportis kun si nur ideojn de senelira situacio.

Du kontraŭaj bezonoj tenis nin kaptitaj. Por retrovi enan pacon, ni devis moviĝi ĝis la aviadilo, kiu flugigos nin hejmen. Sed por kontentigi la grandulojn ni devis ne moviĝi. Samtempe senti du bezonojn kontraŭajn unu al la alia elprenas de infano la etajn fortojn, kiujn ĝi havas.

Plua atendado. Envenis min ideo ege malvarmiga: ĉu oni volas vendi nin? Mi sciis, ke Arabio ne malproksimas. Kaj mi foje aŭdis, ke tie, kaŝe, plu ekzistas sklaveco.

Mia frato rigardis min. Li kompreneble ne povis vidi miajn pensojn, sed li certe sentis ilin, ĉar li rekomencis plori.

Mirinda estas la homa vidpovo. Ni rigardis unu la alian, do ne trans la fenestron. Kaj tamen ni sammomente sentis, ke io tie transe okazas. Samtempe ni turnis la rigardon al la deflugejo. Mir-indaĵo! Ni vidis la aviadilon ekiĝi senmova.

Nova espero replenigis nin. Sed kiam, post ne tro longe, revenis la oficisto, mi ektimis re-foje. Ĉu li rediros: "Ne moviĝu" ?

Feliĉe ne. Li eligis nur la tri vortojn, kiujn mi plej esperis aŭdi: "Venu kun mi".

Finfine ni rajtis moviĝi! Kiam ni eliris el la konstru-aĵo, frapis nin varmego. Ĝibutiaj noktoj povas esti ege varmaj. Sed eĉ tiu varmo estis plaĉa: ĝi signifis alhejmiĝon.

Tuj aŭto alvenis kaj rapide transportis nin ĝis la aviadilo.

"Kial la stevardino ne venis por ni?" mi demandis la oficiston.

"Tiu senpensulino simple forgesis vin," li diris. "Feliĉe, ke mi trairis la trinkejon. Mi tuj telefonis al la kontroluro. La amiko, kiu de tie donas al la flugmaŝinoj permeson forflugi, per radio klarigis pri vi al la piloto."

Mia frato, ridetis, ridis, ridegis.

"Rigardu," li diris, "jen venas movebla ŝtuparo. Nur por ni."

Grava li sentis sin, sed mi min nur malplena. Senigita je fortoj, je pensoj, je vivo.

Kiam ni eniris la aviadilon, la vojaĝantoj ĵetis al ni rigardojn plenajn je malamikeco. Mi subaŭdis iliajn pensojn: "Tiuj du knabaĉoj certe iris perdiĝi ie, kien ili ne rajtis iri. Pro ilia ludemo ni mal-fruas." Mi sentis emon frapi tiujn mispensantojn. Sed kion povas fari knabo kontraŭ tuta aro da fortuloj?

Mi sidis mialoke kaj fermis la okulojn. "Moviĝu, moviĝu, moviĝu," mi diris al la aviadilo.

Se kredi Ivon, mi ripetis tiujn vortojn, dormante, dum longa tempo. Verŝajne mi tiel provis resanigi min el malsaniga sperto: devi iri ien kaj ne rajti moviĝi.

Ĉu en la akvo kuŝas li?

Jako! Kia plezuro revidi vin! Kiam vi revenis?"

Silvinjo! Inter la centoj da homoj ĉe ĉi tiu lagobordo renkonti ĝuste vin! Mi estas feliĉulo! Kiam mi revenis? Hieraŭ. Kaj kredis min, post tiu longa vojaĝo, mi ne plu havis forton. Mi dormis, dormis, dormis. Kiam finfine mi eldormiĝis, tagmeze, kaj sentis la varmegon, mi decidis iri enlagigi min. Kaj jen la unua persono, kiun mi vidas alvenante, estas mia kara amikino Silvinjo, pli bela ol iam ajn..."

Vojaĝi tra Rusio ne ŝanĝis vin. Vi restis la sama belparolulo. Vi ĉiam plu provas igi la knabinojn ami vin, ĉu ne?"

Mi neniam estis speciale belparola. Nur vi ĉiam kaŭzas facilan elflugon de belaj vortoj el mi, pro kialo tuj komprenebla al ĉiu viro, kiu rigardis vin dum du minutoj. Kiu ne dezirus sidi apud vi por interŝanĝi pensojn kun vi tuttage?"

Kiel vi sentas vin, post tiu longa foresto?"

Strange. Estas strange retrovi sin ĉi tie. Aŭ eble la problemo estas ĝuste, ke mi ne retrovas min. Mi sentas, kvazaŭ mi min serĉus, kaj ne sukcesus trovi. Parto de mi ŝajne restis tie. Mi ankoraŭ ne povas kredi, ke mi ree estas en la hejmlando. Kiam oni estis longe for... Speciale en tia lando!"

Kia estas la vivo en Rusio?"

Kiel diri? Mankas la vortoj, kiujn oni bezonus por ĝuste raporti. Mi ne komprenas, kiel la homoj tie sukcesas vivi, kaj tamen ili sukcesas. Sed ĉio tiom kostas! Multaj aĵoj simple ne estas haveblaj, eĉ se oni havas monon. Fakte, kio plej timigas, tio estas la ĝenerala sento pri malcerteco. Neniu scias, kio okazos morgaŭ..."

Ankaŭ ĉi tie neniu scias pri la morgaŭo."

Vi ne komprenas. Tie ĉi, ĉiu havas sufiĉan certecon. Rigardu la homojn ĉirkaŭ ni. Necesas serĉi por trovi iun videble zorgoplenan. En Novosibirsk estas la malo: ĉiuj homoj, kiujn vi vidas, kvazaŭ disradias zorgadon. Povus okazi io ajn. Enlanda milito, reveno de la iama ĝenerala timego, aŭ tia malriĉiĝo, ke plu vivi simple ne eblos. Nur nun ... Sed mi parolas, parolas, kaj vi ne aŭskultas min. Silvinjo! Kio okazas? Kial vi ekstaris? Ĉu mia vojaĝo ne interesas vin?"

Pardonu, Jako. Mia ekzorgo ne rilatas al vi. Mi nur... Sandro! Kie estas Sandro?"

Sandro, ĉu...? Kiu...?"

La filo de mia fratino. Knabo trijara. Sandro! Sandro! Kie vi estas? Li ludis tuj apude. Mi devis zorgi pri li, certigi, ke nenio malbona okazos. Kaj vi... Revidi vin estis tia plezuro, ke mi forgesis mian devon... Sandro, kara! Revenu tuj, kie ajn vi estas!"

Silvinjo neklare duonvidas, ke la ĉirkaŭuloj pli kaj pli rigardas ŝin, sed pri tio ŝi ne zorgas. Se okazis io al la etulo... Kiel ŝi povis agi tiel senpense? Kiam ŝia fratino revenos, kiel Silvinjo povos rigardi ŝin? Kaj jen ĝuste tiuminute la fratino alvenas, kun larĝa, larĝa rideto! Kiel klarigi al ŝi, ke Sandro malaperis?

Al patrinoj tiajn aferojn oni ne bezonas klarigi. Ili sentas. Ne tuj. Kiam ĉi tiu proksimiĝis, larĝe ridetanta, ŝi nur antaŭplezuris revidi la fileton. Sed nelonge daŭris tiu antaŭ-plezurado. Nun ŝi komprenas, ke la knabon ŝi ne tuj vidas. Okazis io. Timo ekkaptas ŝin.

Dum klarigas Silvinjo, la apuduloj aŭskultas. Baldaŭ la demando transdoniĝas de homo al homo: "Malaperis eta knabo, trijara; ĉu vi vidis lin?" Sed la respondo ĉiufoje estas nea. Rapide la afero diskoniĝas tra la tuta ĉelagularo (ĉe-lag-ul-aro). Post nelonge juna gardisto alvenas.

Ĉu mi komprenis ĝuste? Mi aŭdis, ke oni serĉas knabeton. Ĉu vi estas la patrino?"

Jes. Sandro, mia f..."

Li ne lasas ŝin fini. "Kia li estas? Klarigu, por ke ni sciu, kion serĉi!" Li parolas forte, ne tre plaĉe. Eble ankaŭ li timas.

Iom pli ol trijara. Tiom granda," ŝi montras per la mano. "Flavan ĉemizeton li surhavas, kaj ..."

Nenion ŝi povas plu diri. Tiel strange la gardisto ja ripetis: "Flava...", dum lia rigardo ekŝajnis kaptita de la tuj apuda akvo. Ŝia rigardo sekvas lian. En la lago, tute proksime, sed sub jam multe da akvo, io flava videblas, senmova.

Sandro!" La forto de la elparolo estas eksterordinara. Sentiĝas, kvazaŭ tiu nomo nun tenus en si ŝian tutan vivon. Kiel ŝi povos plu vivi, se tiu flava formo ... ? Io ege tranĉa disrompas ĉion en ŝi.

Sed jam la gardisto naĝas en la lago, malsupren. Kiel longa ŝajnas la minuto, dum kiu li tie sube movas sin! Nun liaj manoj ektenas la flavaĵon. Rapidu, rapidu, junulo! Diru ion, aŭ mane komprenigu: ĉu estas...? La streĉiĝo estas preskaŭ netravivebla, dum ĉiuj atendas lian elakviĝon. Ha, finfine li eliĝas. Li ekstaras. Kun, en la mano, ... plasta skatolo, bele flava.

Nur skatolo! Estis nur skatolo! Ĉiuj malstreĉiĝas. Okazas en la patrino kvazaŭ granda liberiĝo, kune kun multaj aliaj sentoj, kiuj turniĝadas, tien kaj reen, tien kaj tien ĉi, plej malklare: ekfeliĉo, zorgo, sen-tim-iĝo, reektimo, espero, ĉio ĉi movas ŝiajn pensojn al tiom da malsamaj direktoj, ke ŝi preskaŭ ne plu scias, kie ŝi estas kaj kio vere okazas al ŝi.

Dankon!" ŝi aŭdas sin diri, kvazaŭ dank'al la gardisto la flavaĵo estus io alia ol la filo. "Feliĉe...!"

Nur malrapide ŝi retrovas iom da paco, sufiĉe por deziri preparoli la aferon kun sia fratino. "Kiom mi timis!" ŝi komencas diri. "Se vi sciis, Silvinjo..." Sed la fratino ne plu apudestas.

Kien do malaperis Silvinjo?" ŝi demandas ĉirkaŭe al neniuj aparta, al ĉiuj. Nur miraj rigardoj respondas al ŝi.

La timo revenas, malhelpas klarpensi. Ŝi eksidas, esploras. Ŝi ne havas la forton demandi, serĉi plu, peti helpon. Ŝi bezonus senti viran manon amoplenan, sed ŝia edzo estas for, kaj eĉ la juna gardisto foriris ien, lasante ŝin sola kun la neportebla zorgego. Ŝi rigardas malproksimen, sen pensi pri io ajn, nenion vidante, kvazaŭ malplenigita je ĉio viva. Ŝi estas en alia mondo, kie tempo ne plu ekzistas...

Kaj jen ŝi eliĝas el tiu stranga senviveco. Ŝi rimarkas, ke neniu restis sida; verŝajne ĉiuj nun serĉas la knabon kun la flava ĉemizo. Tiu penso helpas plu liberigi ŝin el la ena malpleno. Patrinaj sentoj rapide reenvenas kaj redonas povon agi. Ankaŭ ŝi ekstaras, kun forta decido, ke ŝi serĉos, ĝis ŝi trovos lin. Sed kie komenci?

Eksentiĝas ŝanĝo ĉirkaŭe. Io okazas. Ĉu ŝi vidas ĝuste? Ĉu vere, kiel aperas al ŝi, la homoj komencas malstreĉiĝi? Jes, videble multaj nun ridetas. Ili eksciis ion. Jen la starantoj apartiĝas, por lasi lokon al alvenantoj. Mire, dankosente ŝi rigardas: proksimiĝas Silvinjo kaj Jako, kun meze, tenanta ilin mane, eta Sandro. Kiam tiu ŝin vidas, li ellasas la manojn de la du kunirantoj kaj kun rigardo feliĉplena ekĵetas sin sur ŝin. "Patrino!"

Ni ĉie serĉis," la fratino klarigas, "sed trovis lin nenie ĉe la lago, nek en la proksima urboparto. Tiam ni pensis: ni informu la policon. Kiam ni alvenis en la apudan policejon, Sandro estis tie, pace atendanta vin. Iom post iom ni komprenis, kio okazis. Dum mi parolis kun Jako, via filo decidis, ke li iros vin trovi. Li komprenetis, ke dum mi gardas lin, vi faras aĉetojn ne malproksime. Li eliris al la strato. Post kelkaj minutoj, li ne plu sciis, kie li estas. Li komencis plori. Iu sinjoro demandis lin, kion li faras tie, tute sola. Sandro klarigis, ke li volis iri al la patrino, sed ne scias, kien ŝi iris, nek kie li mem estis antaŭe... Li iris kun la sinjoro al la policejo, kaj tie policisto parolis al li tiel amike, ke lia timo tute forlasis lin. Li pace atendis, ĝis vi venos. Fakte, li vidis policistojn veni, foriri, paroli per radio; pli kaj pli li sentis, ke li troviĝas en loko eksterordinara. Lia tuta sinteno, liaj demandoj kaj rimarkoj estigis kvazaŭ amikecan ligon inter li kaj la tiea policisto. Li ja estas ege aminda uleto, ĉu ne?"

Jes," konsentas Sandro, kiu streĉe aŭskultis, kvazaŭ por certiĝi, ke ŝi diros la veron. "Tiel estis."

Multaj homoj staras ĉirkaŭe, rigardas amikkore la rekuniĝon. La patrino tenas la knabeton tiel forte, ke oni preskaŭ timus, ke ŝi rompos lin. Tiom da amo elradias el ŝi! Ĉiuj apuduloj ridetas, feliĉaj pro ŝia feliĉo. Kaj baldaŭ la ridetoj fariĝas eĉ pli larĝaj. Tiel decide, signifplene, gravhome ja sonas la vortoj de Sandro:

Kiam mi estos granda, mi estos policisto."

Gaja

"Morgaŭ!" Tereza plu ripetas al si, ĝis, redirektante la penson laboren, ŝi rimarkas, kun sento de teruro, ke ŝi jam metis la monbileton en la kason. Kaj ŝi forgesis, kia bileto estis. Ĉu kvindekfranka ? Ĉu dudekfranka ? Tiel remeti bileton antaŭ ol doni la reven-monon estas grava eraro. Tion oni devas plej zorgi ne fari. Jam pli ol dek jarojn ŝi laboras kasistino en ĉi tiu supervendejo, kaj senmanke konas siajn devojn. Kaj sian

intereson. Sed ŝi lasis la penson pri morgaŭ turni la atenton for, kaj nun ŝi ne plu memoras, kian bileton la klientino donis al ŝi.

...ok, dek," ŝi diras, preskaŭ ne aŭdeble, dum ŝi malrapide transdonas la reven-monon, provante flankrigardi la starantinon por legi el ties okuloj, ĉu ŝi devus doni plu. "... kaj dek por fari dudek," ŝi finas, pretigante sin al malkontenta reago.

Uf! Estis ĝuste. "De nun mi plej zorge atentu," ŝi diras al si, dum la klientino direktas sin al la elirejo. "Similan bonŝancon mi ne havos dufoje."

Senlabora minuteto. Tiuj okazas sufiĉe ofte, feliĉe, ĉirkaŭ la tria posttagmeze. Ankaŭ ĉe Gaja, ĉe la apuda kaso, staras neniu. Al tiu ŝi sin turnas.

- Ĉu vi scias, kio ĵus okazis al mi?

- Ne. Kiel mi povus?

- Pro vi mi preskaŭ havis malplaĉaĵon. Mi ne plu sciis, kian bileton...

- Pro mi, ĉu? - Gaja interrompas, nekomprene.

- Jes, pro...

Alvenas alia klientino.

- Bonan tagon, sinjorino !

kaj, post multodira okulumo al Gaja, al kiu jam venas nova pagonto, ŝi rekomencas ludi per la klavoj. Diabla okupo! Neniam eblas klarigi ion ĝisfine.

Tamen la situacio ne tro malbone prezentiĝas hodiaŭ. Post minuto ŝi denove sidas senfare. Ŝi turnas la rigardon al Gaja, kiu funkciigas sian kasklavaron kun rapideco malofta ĉe iu tiel nova en la laboro. Nur unu klientino nun tie staras, sed kun kiom da aĉetaĵoj! Amikiĝema virino, ŝajne. Novulino, nekonata. Gaja kaj ŝi interŝanĝas kelkajn parolojn. Ili ridas. Kiom da tempo ankoraŭ, ĝis Tereza povos daŭrigi la komencitan rakonton?

- Ĉu vi fine bonvolos okupiĝi pri miaj aĉetoj?

Malplaĉe sonas la vortoj de la nekontentulo.

- Ho, pardonu, sinjoro, bonan tagon - ŝi diras, samtempe pensante, ke ŝia saluto devus aperi pli natura. Diable! Necesos zorgi iom pli. Se ŝia atento plu iros ludi for, ĉi tiu tago malbone finiĝos. Taktak-taktak. La kaso plu funkcias, sub la rapidaj movoj de manoj kvazaŭ maŝinaj. Ŝi atentigas la prezojn, la klavojn, tamen ŝia pensado samtempe ree kaj ree revenadas al Gaja. Al Gaja, kiu morgaŭ foriros.

Nur unu monaton ŝi restis. Juna studentino, kiu deziris perlabori iom da mono por pagi al si vojaĝon al Greklando. "Kial ŝi gravas al mi?" sin demandas Tereza, kiu ĉiujare vidas novajn studentajn kasistojn aŭ kasistinojn, kiuj estigas en ŝi neniun apartan senton, dum tag-post-tage ŝi sidas ĉe tiu ĉi sama kaso por fari la samajn movojn, saluti la samajn personojn, kiuj aĉetas la samajn aĵojn, senfine...

Ŝi memoras, kiam Gaja unuafoje alvenis. Feliĉa knabino, ridema. Tuj io ŝanĝiĝis en la supervendejo. Kun la aliaj kasistinoj ekzistis neniuj kontaktoj. Ne malamo, feliĉe!, ankaŭ ne malamikeco, sed terura manko de interŝanĝoj. "Bonan matenon!" - "Bonan matenon!", "Ĝis morgaŭ!" - "Ĝis revido!". Nenio pli. Kvazaŭ ili ne vivus, aŭ ili sentus nenion. Gaja alportis vere homan rilatadon, plenan je kunuleco. "Malsola!" Tereza ekpensas, mirante pri la vorto, kiun ŝi ĵus nevole kunmetis. "Jes, ekde la alveno de Gaja, finfine mi spertas ĉi tie malsolecon." Rememore, ŝi ridetas al si.

Fojfoje, iliaj paroloj flugas de unu al la alia super la pagantoj. Sed ŝi preferas la minutojn, kiam neniuj staras ĉe-kase, kaj ili povas vere interŝanĝi ideojn. Kio ŝi estas por Gaja? Verdire, ŝi ne scias. Sed ŝi sentas, ke la knabino ŝatas ŝin, ŝatas la minutojn de kuna ridado, la plezuron konigi al la kunulino sian opinion pri tiu aŭ tiu klientino, siajn ideojn pri la estro, aŭ faktojn pri sia vivo, pri la gefratoj. Dank'al Gaja ŝi retrovis perditan junecon, ŝi sentis sin lerneja knabino, kiu partoprenas en kaŝa ridado, dum la instruisto rigardas aliloken. Tiaj komunaj travivaĵoj naskas senton de kuneco, varmige al la koro.

Ŝi rerigardas Gajan. Ne bela, sed kion signifas beleco? Ne la ekstero gravas, sed la eno. Tiu alta maldika Manjo, kiu sidas ĉe la aliflanka kaso, havas rigardindan belecon. Sed tio ne helpas senti vin malpli sola. Eta Gaja, kun nenio rimarkinda en sia apero, valoras dek Manjojn. Simpla, feliĉiga, plaĉa knabino. Bona. Jes, tiuj vortoj ĝuste priskribas la portempan kasistinon. Gaja alportis al la kas-loko novan aeron, pli kampan, pli sunan. Iam amindecon, antaŭe netroveblan en ĉi tiu monprenejo.

Mi preskaŭ ne konas ŝin," Tereza diras al si. "Kiel eblas, ke mi sentas min tiel malfeliĉa, ĉar morgaŭ ŝi estos for? Ĉu tio estas amikeco? Ĉu en nur unu monato amikeco povas naskiĝi, kiam la rilato estas nenio pli ol interparoloj ree kaj ree rompataj en la mezo?"

En la nuna posttagmeza horo, aĉetantoj ne tre multas. Jen foriras la kliento ĉe la kaso de Gaja. La knabino turnas sin al la kunulino, kiu, same, ĵus liberiĝis de la lasta pagantino.

- Bildigu al vi! Morgaŭ mi estos en Greklando ! - Gaja diras, kaj ŝiajn okulojn plenigas ia grek-ĉiela suno, feliĉ-radie.

- Morgaŭ! - Tereza ripetas. Kaj ŝi eksidas pli rekte por pli bone estri sin. En supervendejo kasistinoj ja ne ploras.

La forto de rigardo

La lasta persono eliris el la trinkejo. Li certe ne povis aŭdi, kion la du junulinoj diras, tro malproksime li sidis. Sed estis pli plaĉe por Dora nun troviĝi sola kun sia amikino. Kiam oni parolas pri la plej malpublikaj partoj de sia vivo, oni sentas sin pli bone sen homoj ĉirkaŭ si.

- Mi estas senforta, tio estas mia problemo - ŝi diris.

Ne estis facile al Dora eligi tiujn vortojn. Pro ili ŝi sentis sin malplivalora. Ŝi ja preferus montri sin same forta, kiel ĉiuj aliaj. Iom necerte ŝi rigardis al Reĝino, la ĉiama amikino. Feliĉe, tiu montriĝis plej komprenema: io tre dolĉa en ŝia maniero rigardi havigis al Dora la forton paroli plu. Dora sentis egan bezonon klarigi ĉion, kion ŝi travivas. Paroli al iu aŭskultema faciligas la vivon. Oni iel transdonas la zorgon al la alia, oni ne plu estas sola por porti ĝin.

- Senforta, ĉu? Kion vi volas diri?

- Mi ne scias uzi mian volon, mian povon voli. Tion mi nomas mia malforteco. Ĉefe rilate al Iljo. Li faras el mi, kion li volas. Kiom ofte mi antaŭe diris al mi: "Ĉi-foje ne plu. Ĉi-foje mi ne plu akceptos" ! Sed kiam li estas en mia hejmo kaj turnas al mi sian petoplenan rigardon, tuj mia decidemo rompiĝas, el ĝi baldaŭ restas plu nenio...

- Estas do facile: ne lasu lin veni en vian hejmon!

- Facile! Por vi eble estus, ne por mi. Kiam mi malfermas la pordon kaj ekvidas lin, belulon, kiu staras antaŭ mi kun demanda, peta rigardo, kaj amindule salutas min..., tiam ĉio en mi fariĝas kiel akvo, nekaptebla, jes tio estas la ĝusta vorto, mi ne plu povas rekapti min mem, jam min forportas lia beleco, lia maniero stari senvorte kiel knabeto, kiun ĉiuj forĵetis, kaj kiu bezonas amon.

- Sekve, vi enlasas lin.

- Mi ne povas agi alimaniere. Li ne bezonas diri unu vorton. Nur rigardi min. Li rigardas min, kaj mi tenas la pordon malfermita, li eniras, li... li... Mi donas min al li. Mi tion malŝatas, eĉ se (mi diru la veron) al iu parto de mi tio ege plaĉas. Sed ĉiam, poste, mi estas furioza kontraŭ li kaj kontraŭ mi mem. Ofte li klarigas, kiom li bezonas monon, kaj mi diras "jes", dum mi volas "ne": mi ja scias, ke neniam li redonos. Mi scias, ke li trinkaĉos, ĝis li ne plu scios, kion li faras. Kiam li komencas tiel trotrinki en mia hejmo, mi ektimas. Sed kiel mi povus malhelpi lin? Li estas tiom pli forta ol mi!

- Se vi ne havus similajn trinkaĵojn hejme, li ne povus...

- Li alvenas kun io. Aŭ li eliras, malaperas dum minuto, kaj revenas kun botelo. Kiam li tiel trinkis, li agas aĉe, nehome, memserve, sen eĉ plej eta zorgo pri la bono de tiu, kun kiu li kunestas. Tiam mi fariĝas por li aĵo, ne plu iu, sed io. Io, por la kontentiĝo de tiu sinjoro, de tiu besto, kiu trovas plezuron en la fakto superforti, igi la alian suferi... Mi estas senforta rilate al li. Sed liberigi sin je la propra malforto, kiel oni povas?

- Diru, Dora, ĉu vi amas lin?

- Kiel vi povas demandi tion, post tio, kion mi rakontis?

- Se vi ne amas lin, kial vi permesas...?

- Mi ne povas malpermesi. Mi devus malpermesi, ke li eniru. Mi devus diri "ne" al liaj petoj pri mono, al lia deziro ludi per mia korpo. Sed mi ne trovas en mi la forton, mi ne scias kial. Tamen, tute certe mi ne amas lin. Se mi lin amus, mi ne sentus min tiel malbone, kiam mi enlasas lin, kiam li tenas min ĉe si kun sia tuta grandega forto, kiam mi kuŝas apud li, kaj ege malplaĉas al mi la penso, ke jen refoje mi enlasis lin kontraŭ mia deziro, sed ial sen povo diri "ne". Kaj kiam li trinkaĉas kaj fariĝas aĉa, kaj mi sentas la furiozon en mi, sed ne povas vortigi ĝin aŭ fari, kion ĝi konsilas, tiam mi scias kun plena certeco, ke mi tute ne amas lin. Vere, Reĝino, mi ne komprenas min mem. Mi ne scias, kiel elturni min el tiu situacio.

- Aŭskultu, Dora, mi konas iun, kiu eble povus helpi vin.

- Kiel eblus? La sola helpo estus, ke li reveturu al sia naskiĝlando, al sia Rusio, kies mankon li tiel suferas sentas, se kredi lin.

- Tamen, kial vi ne irus al tiu virino, pri kiu mi pensas? Mi aŭdis pri plej malfacilaj problemoj, el kiuj ŝi liberigis homojn.

- Kiel ŝi faras?

- Mi ne scias ĝuste. Ŝi faras ion al la eno de la persono.

- Al la eno, ĉu? Kion tio signifas?

- Mi ne scias, ŝi laboras super la nevidebla parto de vi, la nekorpa eno, kie naskiĝas pensoj kaj sentoj, kie vi sentas vin plej vere vi mem. Mi ne komprenas la aferon. Mi scias nur, ke pluraj el miaj amikoj iris al ŝi kun diversaj problemoj rilataj al la propra agmaniero, aŭ al nepovo agi pri tio aŭ tio alia, kaj ŝi ilin liberigis. Ŝia nomo estas Irma.

*

Dora ĉirkaŭrigardis. Ĉio en la ĉambro estis plej ordinara. Kaj ankaŭ la mezaĝulino, kiu akceptis ŝin, prezentis en si nenion rimarkindan. Tiu troa ordinareco naskis en Dora senton de elaltiĝo: ŝi atendis ion alian, ion supernaturan, ion, kio mirigus, kaj vivigus esperon. El tiuj altaj esperoj ŝi nun falis al senbrila ĉiutageco.

- Ha! Vin sendis al mi Reĝino! Bona knabino, mi aŭdis. Persone mi ne konas ŝin, ni neniam vidis unu la alian, sed mi konas plurajn el ŝiaj geamikoj, kaj ĉiuj parolas pri ŝi tute bele. Kion mi povas fari por vi?

- Se diri la veron, mi ne kredas, ke vi povos helpi min. Temas pri viro, rusa muzikisto, al kiu mi ne sukcesas kontraŭstari, eĉ kiam li volas fari aferojn, kiujn mi ene de mi malakceptas, sed...

- Ene de vi! Jen, ion similan mi atendis. Mia fako estas ĝuste tio, kio estas ene, plej ene de la homoj. Mi rigardas tien, en la nevideblon, mi vidas, kio malbone funkcias, kaj mi rebonigas la aferon. Nemultaj homoj povas vidi kiel mi ene de la eno de homo, sed mi ricevis de la Ĉielo tiun donon.

Dora rigardis ŝin nekredeme. Ŝi ne havis klaran ideon pri tio, kion ŝi atendis, sed ŝi antaŭvidis ion alian, virinon kun videble superhomaj povoj aŭ, male, iun tute simple homan, sed kiu estus scienca fakulino pri homa agado. Eble ŝi esperis vidi iun specialan ilon, kiu pensigus pri transmondaj metodoj aŭ pri alta scienco. Sed ĉi tie troviĝis nenio speciala. Kiel tia persono povus helpi? Tamen, Dora plu klarigis pri Iljo, pri lia emo trinki tro multe da vodko kaj pri sia nepovo diri "ne" al li. Fine ŝi demandis, iom zorge:

- Kiom mi devos pagi?

- Nenion. Mi helpas al la homoj por utili al ili, ne por ricevi monon. Mia edzo mortis, lasis al mi, ne riĉegon, sed sufiĉe por vivi. Vi scias, kiam oni estas feliĉa, oni ne bezonas havaĵojn por senti sin bone, kaj nur iomete manĝi sufiĉas por teni sin sana.

Kiel dirite, komence Dora miris pri nenio en ĉi tiu plej ordinara loko, krom pri ĝia ordinareco. Sed pli kaj pli nun ŝi sentis miron, tamen sen scii ĝuste pri kio. Ĉu io en la sinjorino? Jes. Kaj io en la ĉambro. Ŝajnis, ke tiuj tute ordinaraj aferoj kaŝis en si ian specialan vivon. Kaj same s-ino Irma; ŝi ŝajnis plej simila al ĉiuj samaĝaj neriĉaj virinoj, sed post iom da tempo oni sentis, ke tio estas nur ŝajno. El ŝi io radiis, io ne tuj sentebla, sed pli kaj pli klara nun, dum la du sidis tie en longaj senvortaj minutoj.

"Paco," diris al si Dora: ŝi fine sukcesis vortigi la nekularan senton, kiu iom post iom plenigis ŝin. "Ĉi tiun lokon markas paco, kian oni malofte trovas niamonde." Kaj post kiam ŝia penso pri tio iĝis tute klara, ŝin kaptis sento de mirinda kontenteco, tiel plaĉa, verdire, ke unuafoje en sia vivo ŝi sentis sin proksima al plena feliĉo.

- Necesos, ke vi kuŝu - diris la sinjorino.

Ŝi montris al Dora sofon, sur kiun la junulino ekkuŝis.

- Bonvolu fermi la okulojn - ŝi diris preskaŭ ne aŭdeble.

Dora fermis ilin. Ŝi miris pri sia akceptemo: ŝi ne kontraŭdiras, nenion demandas, la sinjorino diras ion, kaj tion ŝi faras. Ial, tiu farmaniero rilatis al la ĝenerala paca ĉirkaŭaĵo. "Al persono, kiu disradias tian pacon, oni povas nur jesi", ŝi diris al si. Sed tuj sekvis alia penso: "Ĉu mia ĉefa problemo en la vivo ne kuŝas ĝuste en tio, ke mi ne povas respondi al homo alimaniere ol jese? Se tiel, ĉu estas bone pliafoje lasi iun alian direkti, kion mi faru?" La demando, tamen, malaperis same rapide, kiel ĝi vortiĝis. Estis pli plaĉe ne pripensi, nur lasi la pacosenton pleniĝi ŝin tute.

Kaj jen ŝi sentis etan movon: s-ino Irma verŝajne metis sian manon, aŭ siajn manojn, super ŝin, tiel ke moviĝis iom da aero, senteble. Dora sin demandis, kio okazas, sed ŝi ne malfermis la okulojn. Ŝi povus, sed, sen kompreni kial, ŝi ne deziris; estis multe pli facile teni la okulojn fermitaj. Nun eksonis vortoj, ege malrapidaj: la mezaĝulino parolis en tre paca, dolĉa maniero. Kiel bona patrino. Tiu parolado estis preskaŭ kanta, ĝi similis al la kantetoj, kiujn oni aŭdigas al malgrandaj infanetoj por ilin dormigi. Dora pli malpli dormetis, sed samtempe aŭdis:

- Faru nenion, nur lasu miajn vortojn porti vin, kiel patrino portas infaneton, lasu ilin eniri en vin kaj venigi vin al duondormo. Sentu, kiel plaĉa ĉi tiu paco estas. Vi sentas vin bone, ĉu ne?, pli kaj pli bone. Ne gravas, se vi endormiĝos. Miaj paroloj agos, eĉ se vi ne aŭskultos ilin. Lasu bildojn formiĝi en vi. Jen, mi parolas, vi aŭdas sen vere aŭskulti, vi duondormas pli kaj pli, kaj baldaŭ bildoj aperos, responde al miaj vortoj. Kaj dum mi parolas kaj lasas vin iĝi kiel eta infano, kiu sentas kun granda plezuro, ke patrino ĝin amas, dume mi movas la manojn super vi, kaj mi metas ilin sur vian nevideblan korpon, kaj al tiu mi transdonas la forton, kiun mi ricevas el la Ĉielo. Jes, jes, vi havas ne nur la korpon, kiun vi vidas. Ĉiu el ni havas aliajn, nevideblajn korpojn, pri kiuj scienco ne parolas, sed kiuj gravas, por ke oni sentu sin bone...

Dum ŝi tiel parolis, Dora sentis, ke io en ŝi respondas al la vortoj kaj al la manmovoj de s-ino Irma, io, kio ne dependas de ŝia volo, sed kio ŝajne estas alia vivo en ŝi, kiun ŝi ne konis. Nekompreneble. Eĉ nevortigeble. Iel, ŝi disdubiĝis. Parto de ŝi trovis la agadon de s-ino Irma vere stranga, kaj plu havis sian ĉiaman manieron pensi, siajn opiniojn, sian emon malakcepti la tutan situacion, rigardi ĝin ridinda kaj eble eĉ malutila, sed en dua parto de si ŝi sentis sin infaneto: tie okazis aferoj, super kiuj ŝi havis neniun povon, kaj kiujn la unua parto rimarkis kun intereso, sed sen povi fari ion pri ili. Feliĉe, la sentoj en tiu infana parto estis tre plaĉaj. Ŝi estis tute certa, ke el s-ino Irma povas veni nur bono, eĉ se ŝi samtempe sciis, ke ŝi ne vere konas ŝin, kaj ke ŝi havas neniun kialon por kredi je ŝia plena boneco.

- Bildigu vin mem al vi - s-ino Irma diris. - Lasu la okulojn fermitaj kaj enpense formu bildojn, kiel bildojn de filmo. Vidu vin en via loĝejo. Memoru ĝin, prezentu ĝin

al vi pense. Rigardu per la penso vian loĝejon, kaj nun pli speciale ĝian eksteran pordon. Dum mi parolas, la bildo formiĝas, tute certe. Ĉu jes ?

- Jes - respondis Dora duondorme.

- Bone. Vi vidas ĝin pli kaj pli klare, ĉu ne? Kaj nun jen iu venas. Vi iras malfermi la pordon. Estas Iljo. Kiel bela li estas! Forta, alta, larĝa. Krome, oni ne povas vidi lin sen pensi pri la muziko, kiun li ludas, mirinde bele. Vidu, kiel li ridetas al vi, per bela, kortuŝa, sed senfeliĉa rideto. Samtempe li elmetas rigardon de perdita knabo, kiu bezonas vian helpon. Sentu, kiel vi pretas respondi al ĝi... Ĉu vi tion sentas ?

- Ho jes, tia mi estas.

- Nu, dormetu plu. Travivu la filmon ene de vi. Mi plu parolos, Kaj miaj vortoj plu helpos, ke la bildoj aperu en vi unu post la alia, kiel en filmo aŭ en sonĝo.

*

Dum minuto nun s-ino Irma restas senparola; sentebblas, ke ŝi plu movas la manojn super la kuŝa korpo. Kiam ŝi reparolas, ŝia maniero estas tute alia. Kie antaŭe estis dolĉeco, tie nun granda forto aŭdiĝas. Ŝi parolas, kiel iu kun superaj povoj. Kiel ĉefo.

- Nun mi transdonas al vi mian forton. Sentu, ke la forto envenas vin, plenigas vin. Tra miaj manoj super vi, ĝi transiras al via persono, al via tuta estaĵo. Vin eniras forto, kiun mi ricevas de tre alte, de lokoj, pri kiuj vi eĉ ne scias, ke ili ekzistas, trans nia mondo. Tiun forton mi transdonas al vi. Kaj dank'al ĝi vi reagos malsame. Vidu, la filmo rekomenciĝas.

*

Dora sentas sin strange. Certe io ŝanĝiĝis en ŝia personeco. Ŝi restis si mem, sed ŝi estas malsama, pli forta, nekredeble pli forta. Aŭ pli ĝuste, ŝi ne ŝanĝiĝis, ŝi nur renkontis en si ion, kio ĉiam tie haveblis, sed kion ŝi ne konis, kaj ne sciis uzi : forton.

- Nun vi sentas, ke vi povas diri: ne. Tiu reago venas tute nature. Vi rigardas Iljon, vi trovas lin bela, amikiĝema, helpinda. Vi aŭdas lian peton. Vi scias, kiel mirinde bele sonas lia muziko. Vi vidas ĉion ĉi. Sed samtempe vi vidas, ke Iljo estas iu sinservema, kaptema, kaj ankaŭ vinemulo, vodkemulo, kiun trotrinkado transformas al bestaĉo. Vi vidas, ke li pensas nur pri si, pri sia plezuro, kaj ne pri tio, kion li faras al la aliaj, ĉefe al vi. Ĉio ĉi fariĝas pli kaj pli klara. Fariĝas tute certe, ke vi povas nur diri : ne. Nun, kun forto kiel eble plej granda, diru "ne" al li.

- Ne! - Dora diras kun fortega decidemo.

- Bone. Jes, vi diras "ne" al li. Vi komencas fermi la pordon. Li turnas al vi okulojn petegajn, li provas igi vin agi liaserve. Sed vi scias, ke el tio sekvus nur malbono. Vi

decidis, ke vi agos por via bono kaj por lia bono, neniam plu por io aĉa. Kaj tio signifas: ne enlasi lin. Enlasi lin estas malbone por vi, sed ankaŭ por li. Vi do fermas la pordon. Vi fermas ĝin tiel rapide, ke li ne havas la tempon reagi. Li miras (vi povas vidi lin, kvankam li staras trans la pordo ; estas ja kiel en filmo, aŭ en songo). Li aŭdigas sin, li eligas tutan riveron da parolaĉoj, li frapas la pordon, forte, ankoraŭ pli forte, furioza kontraŭ vi. Vi vin demandas, ĉu li rompos ĝin. Vi ektimas, sed tuj poste okazas io mirinda: vi sentas, ke la timo rapide malaperas for. Nun vi estas tute paca ene. Vi komprenas, ke estas nature por li tiel agi - vi vidas lin infano, kiu ne akceptas, ke oni kontraŭu lian volon - sed vi sentas vin granda, rilate al tiu eta-eta infano. Vi decidis, ke vi ne enlasos lin, kaj kion vi decidis, tion vi faras. Vi sentas vin forta, pli kaj pli forta, pli forta ol tiu trotrinkulo, ol tiu knabeto kun la petegaj okuloj, ol tiu ulo ĉiam ema trouzi bonvolemon amikan... Ĉu forta li estas? Ne vere. Jam superfortas lin botelo da vodko! Lia forto estas nur ŝajna. Granda korpo, eble, sed en ĝi nur malforta infano. Pensu pri viaj okuloj. Sentu la lokon super via nazo, inter la okuloj, sed iom pli supre. Diru al vi, ke la forto venas el la plejprofundo de vi kaj supreniras ĝis tie. Sentu tiun movon de la forto ĝis la okuloj. Ĉu vi sentas ĝin?

- Eble. Mi ne scias. Iomete.

- Ne gravas, se vi ne sentas ĝin klare. Sufiĉas, ke vi bildigu al vi la movon. Vian tutan volon vi povas meti en la okulojn, aŭ, pli bone, inter ilin, iom pli alte. Tiam vi rimarkos jenon: li estas pli malforta ol via rigardo...

Dum la sinjorino parolas, Dora travivas la okazaĵojn. Ŝi scias, ke ne envere ŝi vidas kaj aŭdas. Sed, iamaniere, ene de si, ŝi vidas la fermitan pordon, ŝi aŭdas la furiozajn vortojn de Iljo, lian manon, kiu frapas kun granda forto la pordon, kaj tiun resonigas. Kaj ŝi sentas, ke ŝia timo malaperas, ke envenas paco, ke stranga sento pri forto nun enloĝas tie, kie timo kaj troa jesdiremo antaŭ nelonge vivis. Ŝi ekpensas - neniam tiu penso aperis en ŝi antaŭe - ke se la najbaroj malkontentos, ili furiozos kontraŭ Iljo, ne kontraŭ ŝi. Ŝi sentas, ke ŝia rigardo sukcese superfortos lin. Tiu sento plenigas ŝin, dum la enpenso filmo finiĝas.

Sekvas longeta senparola tempo, dum kiu Dora plezuras pri sia ena paco. Mirinde plaĉa sento, kian ŝi neniam spertis antaŭe: ia plena certeco, ke nenio malbona povus okazi al ŝi.

- Nun preparu vin iom post iom eliri el la duondormo - diras s-ino Irma. - Kiam vi sentos vin preta, vi malfermos la okulojn, sed ni havas tempon, estas neniu kialo por rapidi. El la malsupraj dormregionoj revenu supren. El la plej ena mondo revenu en la eksteran. Sentu vian korpon. Sentu, ke ĝi ree povas movi sin. Vi deziris resti senmova, ĉu ne? Estis granda plezuro ne moviĝi. Sed nun la deziro ŝanĝiĝas: vi deziras ree movi vin. Enpense diru: unu, du, tri, kvar kaj tiel plu ĝis dek, malrapide, je la rapideco, kiu plaĉas al vi, kaj kiam vi diros "dek", malfermu la okulojn. Vi miros, kiel bone vi sentas vin.

Dora faras, kiel diris s-ino Irma. Ŝi malfermas la okulojn, movas sin iomete. Tiel ŝi eliras el la duondormo. Sur la sofo ŝi nun sidas, vid-al-vide de la pli aĝa virino.

- Kiel vi sentas vin? - ĉi-lastas demandas.

- Mirinde. Mi ne kredis, ke eblas senti sin tiel bone. Mi preskaŭ povus sukcese kontraŭstari Iljon.

- Ĝuste vi uzas la vorton "preskaŭ". Necesos, ke ni rekomencu eble dekfoje, por ke vi estu nemovebla en via volo kaj por ke viaj decidoj transformiĝu en faktojn. Ĉu vi akceptas, ke ni revidu unu la alian kaj plu laboru por plifortigi vin? Je kiuj tago kaj horo vi povos reveni?

*

Jam la saman vesperon Iljo ree staris ĉe la pordo. Kontraŭ sia volo, ŝi enlasis lin. Kiel ĉiufoje antaŭe, ŝi sentis sin senpova rilate al li. Rimarki tion kaŭzis elaltiĝon. Ie en ŝi ja brilis espero, ke ĉi-foje, post la interveno de s-ino Irma, ŝi sukcesos diri "ne".

Ĉio rekomenciĝis, kiel antaŭe. Monon li volis, kaj gekuniĝon. Kaj ŝi jesis. Dum li kuŝis sur ŝi, ŝi sentis la ĉiufojan strangan kunecon de plezuro kaj malplaĉo, de karula ligiteco kun malamo forĵetema; refoje ŝi pensis: "Kiel malsimpla mi estas! Mi ne komprenas min". Kaj tuj poste sekvis la penso: "Nenio ŝanĝiĝis". Tiu rimarko, maldolĉa, senigis ŝin je espero. Tial ege ŝin mirigis liaj vortoj:

- Kio okazis? Vi ne estas la sama!

Estis tiel neatendite, ke ŝi restis longe sen respondi.

- Nenio speciala - ŝi fine diris, kaj stranga feliĉeto envenis en ŝin. Ĝuste kiam ŝi pensis, ke ĉio restis senesperige sama, ĝuste tiam li rimarkis ŝanĝon en ŝi.

Ŝi aldonis:

- Kion vi volas diri? Kio ŝanĝiĝis?

- Mi ne scias. Mi ne povas klarigi. Vi ne reagis same. Vi estas pli... Mi ne trovas la vorton. Mi ne komprenas, kio ŝanĝiĝis, sed vi... vi estas malpli mia. Tio kaŭzas en mi strangan senton. Parto de mi kontentas pri la ŝanĝo, kaj parto de mi furiozas. Mi sentis ŝanĝon, sed klarigi ĝuste, kie ĝi kuŝas, tio estus super miaj nunaj fortoj. Ba! Ne utilas paroli pri aferoj nedireblaj. Mi bezonas trinki. Botelon da revivigilo mi plezure malplenigos nun.

Li ekstaris kaj iris kuirejen.

Kiel preskaŭ ĉiufoje, li tro trinkis, kaj, kompreneble, ne akvon. Kiel preskaŭ ĉiufoje, li tiam parolaĉis, uzis pri Dora, suferige, plej malaltigajn vortojn. Sed nur komence. Post iom da tempo, ŝi sentis la forton ekkreski en ŝi. Ŝi strange sentis, ke ŝi iel povas venigi ĝin de ie malsupre al siaj okuloj, aŭ al loko inter la okuloj, iom super tiuj. Tuj kiam li provis bestaĉe agi, ŝi rigardis lin kun speciala brilo en la okuloj. Ĉe ĉiu tia provo lia, ŝia rigardo direktiĝis al li, signifplene, volplene. Tiuj rigardoj igis lin senpova. Estis rigardoj subigaj, rigardoj de ĉefo al subulo. Ili devigis lin fariĝi pli homa, ol li deziris. La ŝanĝon en sia rigardmaniero ŝi bone sentis, kaj ŝi plezure rimarkis la sekvojn. Ankaŭ en ŝia maniero paroli nova forto nun aŭdeblis.

"Ĉu la strangaj faroj de s-ino Irma tamen utilis?" ŝi demandis sin, kiam li estis for.

*

- Tiuj estas bonaj novaĵoj! - diris la mezaĝulino. - Pri tio, kio okazis, mi tute ne miras, sed mi opiniis, ke la ŝanĝo venos pli malfrue. Post nur unufoja laboro, tio estas mirinda. Nun ni rekomencu. Ni plifortigu vian volon. Bonvolu ekkuŝi sur la sofon kaj nenion plu rigardi, krom la ena filmo, la kvazaŭ-sonĝo, kiun miaj vortoj aperigos en vi.

Dora kuŝis sursofe, fermis la okulojn, falis en dormeton, dum la iom kanta parolado de la sinjorino vivigis en ŝi sentojn kaj bildojn, kiuj iel ŝanĝis ŝiajn ideojn pri si.

Unufoje ĉiusemajne ŝi iris al tiu stranga renkontiĝo. La sento de ena paco iĝis de fojo al fojo pli klara kaj plaĉa. Kaj ankaŭ la sento pri ena forto. Ŝia decidemo, ŝia volo, ŝia povo transiri de deziro al decido kaj de decido al fakta agado videble kreskis pli kaj pli. Kaj pli kaj pli ŝi komprenis, ke la forto de Iljo estas nur ŝajna, ke li ne havas veran povon voli, ke, dum ekstere li aperas vira, li estas, ene, nur infano, al kiu sufiĉas diri kun forto, kion oni volas, por ke tion li faru, se la propran volforton oni scias meti en sian rigardon.

*

- Mi ne enlasos vin - ŝi diris al Iljo. Ĉi-foje, ŝi sentis, ke ŝi vere havas la forton kontraŭstari lin.

Sed liaj okuloj montriĝis akvaj, lia rigardo pli petema ol la aliajn fojojn, lia sinteno de perdita knabeto pli sentomova.

- Nur lasu min dormi ĉi tie - li petegis. - Mi estas forĵetita el mia loĝejo. Mi agis tiel aĉe, post kiam mi trinkis, ke oni ne plu lasas min vivi tie. Mi ne plu havas loĝejon. Du aŭ tri noktojn, mi petas, nur du, tri noktojn ĉe vi, ĝis mi trovos vivlokon! Mia situacio estas senespera! Al kiu mi povus turni min?

Ŝi sentas, ke ŝiaj antaŭdecidoj disfalas. Li ĉiam havis apartan povon devigi ŝin doni, kion li deziras, kaj hodiaŭ tiu povo ŝajne dekobliĝis. Tamen... Ĉu li nur uzis sian ordinaran povon super ŝi, aŭ ĉu ĉi-foje lia situacio estas multe, multe pli malfeliĉa? Estas fakto, ke lia sinteno malsamas: liaj paroloj hodiaŭ sonas pli veraj. Videble, li troviĝas ĉe la fino de siaj ebloj. Pri tio oni ne miru. La vojo, kiun li elektis, ja povis faligi lin nur tien: en vivon senmonan, senlaboran, sen plua espero.

Ŝia donemo superas : ŝi enlasas lin.

Li eniras, sidfalas sur seĝon. Eble unuafoje en liaj okuloj ŝi legas veran suferon. Kunsento pri tiu sufero ŝin kaptas. Sed samtempe ŝi scias, ke ŝi ne akceptos fari ĉion, kion li petos. Nun ŝi sentas sin vere forta.

- Mi konsentas, ke vi dormu ĉi tie kaj restu du aŭ tri tagojn. Sed vi faros, kion mi diros al vi. Vi ne trinkos vinon aŭ vodkon. Dum la manĝoj trinkeblos nur akvo. Vi kuŝos sola kaj ne venos en mian dormoĉambron. Vi ne uzos parolaĉojn, eĉ por klarigi pri via situacio. Tiu povas esti tre malfeliĉa, tamen vi povas priskribi ĝin per ordinaraj vortoj. Se vi agos kiel aĉulo, mi tuj sendos vin for, kaj neniam plu vi revenos. Kio estas aĉa agado, kaj kio ne, tion decidus mi, kaj nur mi. Mi ne akceptos kontraŭopinion de vi. Se vi estas preta agi, kiel mi diris, vi povas resti, sed nur se tiel. Ĉu vi konsentas?

Iljo rigardas ŝin longe.

- Vi vere ŝanĝiĝis! - li mire diras. - Mi akceptas. Kion mi povus fari?

- Komprenu, ke kion mi diris, tion mi faros! - ŝi diras kun decidemo tute neordinara en ŝi.

- Jes, tion mi sentas - li respondas. Io en ŝia rigardo, io nova, timigas lin nun.

Dum ŝi preparas manĝon, li rakontas pri sia situacio, sen uzi eĉ unu vortaĉon. Kaj dum ili manĝas, li preskaŭ ne parolas. Li de tempo al tempo levas la okulojn al ŝi, kaj rekomencas manĝi senvorte. Li trinkas nur akvon, kaj poste petas nenion alian. Tuj post la manĝo li iras al la kroma dormoĉambro, kaj el ĝi neniu sono aŭdiĝas. Dora travivas preskaŭ senzorgan vesperon. Ek de kiam ŝi ekkonis lin, estas la unua paca vespero, kiun ili spertas samloĝeje.

*

La postan matenon, kiel ĉiutage, Dora iris labori. Iljo restis sola en la loĝejo. Sola, sed kun botelo da vino, kiun ŝi antaŭe ricevis de geamikoj, kaj lasis en la kuirejo.

Kiam post la labortago ŝi revenis hejmen, Iljo estis for, kaj la botelo malplena. La glaso, malpura, staris sur la kuireja tablo.

- Li eĉ ne havis la ideon ĝin purigi - ŝi pensis, furioza.

Ŝi konis lin sufiĉe por scii, ke eĉ post tia aĉa agado, li provos reakceptigi sin. Ĉu ne jam delonge li agis aĉe al ŝi, kaj ĉiam ŝi lin bonvenigis? Ke li trinkis la vinon, tio montras, ke li ne komprenis, kiel grave ŝi ŝanĝiĝis. Ŝi antaŭvidis ĝuste : vespere li prezentis sin ĉe la pordo.

- Estas senutile - ŝi diris, eĉ antaŭ ol li havis la tempon eligi vorton. - Mi lasis al vi eblon rebonigi la bildon, kiun mi havis pri vi. Mi akceptis vian peton, ĉar vi ŝajnis vere helpinda. Sed estis klare, ke vintrinkadon mi ne akceptos. Vi sciis, ke ĝi estas malpermesita. Kaj tamen vi malplenigis tutan botelon.

- Aŭskultu, mi estis tiel malfeliĉa, senhelpa. Mi ne povis deteni min. Sed mi repagos al vi la botelon. Mi certigas, ke de nun...

- Ne perdu vian tempon kun malveraj certigoj. La kosto de botelo tute ne gravas. Sed mi lasis al vi okazon montri vin akceptebla. Vi ne uzis la okazon. Estas finite. Neniam revenu.

- Kiel vi povas esti tiel senkora? Ĉu vi ne komprenas, ke mi ne plu havas laboron? La muzikistaro, kun kiu mi ludis, forĵetis min. La loĝdonanto, kiu havigis al mi ĉambron, sendis min for. Kion mi faru? Mi ne havas lokon por dormi.

- Tio estas via problemo, ne mia. Lernu prizorgi vin, superi vian trinkemon, mi ne scias, kion vi faru, vi de nun staras ekster mia vivo. Ne pro mi: mi havis la malfortecon akcepti vin lastfoje kontraŭ ĉia sana pensado. Sed la okazon, kiun mi lasis, vi ne sukcesis bon-uzi. Via vivo estas via, ne mia, faru el ĝi, kion vi volas. Tio ne interesas min.

Kaj kun nemovebla decido, ŝi fermas la pordon.

*

Tri monatojn poste

"Botelo da vino, ĉu? Kiel strange! Kiu do sendas botelon da vino al mi? Ha, en la ĉirkaŭpapero enestas ankaŭ letero!"

Kara Dora!

Kiam vi malakceptis min en tiu tago, post kiam *mi trinkis vian vinon, mi furiozis kontraŭ vi*, sed mia furiozo estis senforta, tiel senespera estis mia situacio. Anstataŭ frapi kaj vortaĉi, mi do simple foriris. Mi ne rakontos, kien, kaj ankaŭ ne, kion mi faris poste. Mi nur volas redoni similan botelon. *Kaj danki vin. Se vi tiam akceptus min viahejmen, mi certe ne eliĝus el mia mortovivo.* Mi certe ankoraŭ ne tute eliĝis. Sed espero revenis. Mi ekrilatis kun la grupo "Sennomaj trotrinkuloj". Ĉu vi aŭdis pri ĝi? Estas homoj, kiuj suferas pro la sama *problemo kiel* mi, kaj kiuj helpas unu la

alian, kaj kunvenas por priparoli la aferon. Kiam oni parolas kun homfratoj, kiuj spertis la samon, oni sentas sin multe pli bone, kaj espero revenas.

Dank'alilia subteno, ĝis nun mi sukcesis vivi sen vodko, vino kaj *similaj trinkaĵoj*. *Nekredeble, sed vere. Se mi sentas emon, mi telefonas al membro de la grupo, kaj ili parolas tiel amike kaj signife, ke ili sukcesas min forturni. Tion ni faras unu por la alia. Ĉu mi sukcesos longe elteni? Mi ne scias. Sed jam estas belege, ke realflugis espero, kaj ke mi ne plu estas sola.*

Mi ree trovis etan laboron, nur tre partatempan, sed estas pli bone ol nenio. Tri vesperojn semajne mi muzikas en trinksalono, kie mi sukcesas ne trinki bestigaĵojn, Ĉu ne mirinde?

Mi estis malbonulaĉo por vi. *Mi petas vian pardonon, sed mi tre bone komprenos, se vi ne povos ĝin doni. Kiel mi agis rilate al vi, tio estas nepardonebla. Sciu, ke tion mi scias, kaj akceptas.*

Mi tamen volas danki vin. En via rigardo estis la forto de ĉefo, mi emus diri: *la forto de la patro*, kiun mi neniam havis, kaj pro kies manko, eble, mi ne sukcesis bone direkti mian vivon. Sen via nemovebla forto, tiun vesperon, mi eble jam ne plu vivus. Aŭ mi vivus vivon nehoman, eĉ pli nehoman ol antaŭe. Dankegon do! Sanu kaj feliĉu! *Estus troe, ke mi petu vin pensi pri mi, mi tion ne indas. Sed se tamen vi bonvolus de tempo al tempo havi pri mi penseton, tio helpus min. Homo bezonas kredi, ke li ne estas forgesita. Dankon refoje, kaj ĝis - eble - amika revido!*

Iljo

*

Iljo rigardis kaj ririgardis la papereton.

"Kia stranga knabino! Ŝi ne reagis al mia letero, ŝi ne parolas pri pardono, ŝi ne starigas demandojn pri mia senpatra infaneco, ŝi ne diras, ke ŝi pensos pri mi, ŝi ankaŭ skribas pri mi nenion malbelan aŭ malaman, kiel estus nature. Nur kelkajn nekompreneblajn vortojn:

S-ino Irma Belamano, Kolombostrato 12 B, loĝejo n-ro 23. Diru mian nomon kaj rakontu ĉion al ŝi.

"Irma Belamano, ĉu vere? Tiun nomon mi jam aŭdis, sed kie? Ha jes, en la grupo! Estas la virino, kiu plej amike aliris min, kiam mi iris tien unuafoje, kaj kiu diris: 'Mi estas membro de la Sennomaj Trotrinkuloj, sed mi ne estas sennoma. Mia nomo estas Irma Belamano. Mi sentus min pli ĝuste hejme en grupo nomita *Senmonaj Trotrinkuloj*, haha!' Jes, estas ŝi! Mi klare memoras nun: mezaĝa virino, ege patrineca,

kiu rakontis antaŭ du semajnoj, kiel malfacile estas por ŝi trovi la forton diri "ne" al botelo... Kial do Dora volas, ke mi vizitu ŝin?"

Ismet

Mi rigardis al ili, kaj min plenigis sento de granda feliĉo. Dudek geknaboj dekunuajaraj, ĉiu kun kapo direktita al sia skribaĵo. Preskaŭ neniu sono aŭdiĝis en la klasĉambro: klare, ĉiu pensis nur pri sia laboro. Kial tiu feliĉo? Estas malfacile diri. Eble la klariga vorto estus *amo*. Mi amis ilin. Tiun ĉi klason mi aparte ŝatis ek de la unua tago.

La vivo de instruisto ege ŝanĝiĝas de jaro al jaro. Estas jaroj malbonaj, mezbonaj, bonaj, depende de tio, kiel sin tenas la lernantoj. Sed jaro kiel ĉi tiu estis maloftaĵo: nur infanoj bonvolemaj, lernemaj, trankvilaj, tamen vivplenaj, ĉiam pretaj ridi sed neniam malbonuzi siajn fortojn aŭ direkti vortaĉojn al kunulo aŭ mi. Ne mirige, ke mi sentis kontenton, dum mi rigardis ilin.

Snuf! Snuf! La preskaŭ neaŭdebla sono igis min turni mian rigardon al Ismet. Li videble provis estri sin, ne vidigi, kio okazas al li, sed li ne sukcesis. Li subrigardis min, kaj tiu timemula rigardo, akvoplana, movis miajn sentojn ĉiudirekte. Tiu maniero agi tute ne estis ordinara. Nia Turko ja ne estis timema infano, male, tute male, li eble eĉ estis la plej sentima el ĉiuj. La ludojn ofte estris li, kaj la ridojn enklase ofte ankaŭ li ekvivigis. Li disradiis forton, kiun li neniam trouzis, kaj lia maniero sin teni, sen supereco, sed ankaŭ sen malsupereco, igis lin aparte ŝatinda al la kunularo.

Sed nun el tiu forto restis ŝajne nenio. Li aperis pli eta, pli infaneca. Li ploris.

Malrapide, mi proksimiĝis al li. La studan etoson de la klaso mi ne volis rompi. Tial mi simple metis mian manon sur lian, amike, varmasente. Kaj demande. Li turnis al mi la kapon, kaj ree io senespera en lia rigardo movis miajn sentojn plej dise. Senparole li transdonis al mi paperon. "**Oficejo pri eksterlandanoj**" frape diris, supre, la presitaj vortoj. Antaŭtimo kaptis min tuj, kiam mi vidis tiun surskribon, kaj dum mi legis la suban maŝinskribaĵon, mi sentis min pli kaj pli malfeliĉa: tiu papero informis la familion de Ismet, ke ĝia restadpermeso ne estas renovigita: ili devos reveturi Turkien. Dum iom da tempo ni rigardis unu la alian senvorte. Estis io ege maldolĉa en lia rigardo, kaj mi provis meti en mian kiel eble plej multe da dolĉo, da amikeco. Mirige, ĉu ne?, kiel forte parolas kelkfoje senvorteco! Mi redonis la paperon al li, kaj penseme reiris al mia loko. Mi ne sciis, kion fari.

Stare antaŭ la klaso, mi vidis, ke la infanoj finis sian laboron. Mi min demandis, ĉu mi nun transiros al alia instruaĵo. Sed mi ne povis. Iom senpense, mi komencis paroli, ne

tre certa, kion mi faras. Ŝajnis, ke ne mia volo direktas miajn vortojn, sed io alia, pli forta, pli natura, pli sentoplena en mi. Tiel mi aŭdis min klarigi pri la baldaŭa foriro de Ismet. Kiam mi finis, la ejon plenigis morteca etoso. Kiel dum la antaŭa laboro, la ĉambro estis tute sensona. Sed ĉi-foje la rigardoj estis turnitaj al mi. En ili legeblis nekompreneo, miro, nepovo akcepti. Ŝajnis, ke la novaĵo senvivigis la klason. La geknaboj plu sidis senvorte, kiel aĵoj, ne kiel estuloj vivantaj. La aero ŝajnis tute malvarma.

"Ili tro amikas al Ismet," mi pensis. "Ili ne akceptas, ke li forlasu nin."

Tiu mortosento daŭris nur kelkajn minutojn. Post nelonge, ek, la senliveco disrompiĝis; la ordinare trankvila klaso iĝis nereconebla: jen ĉiuj lernantoj samtempe ekkriis, manoj moviĝis diversflanken; iuj infanoj ekfrapis sian tablon resonige; aliaj forlasis sian sidlokon por iri paroli kun Ismet; ia grupa frapemo, ordinare tute dormanta ĉi-klase, senligiĝis, ekliberiĝis neestrebale kaj plenigis la ĉambrojn per zorgiga, timinda rompopovo. Nur vorta, feliĉe: la geknaboj nenion rompis. Sed mi sentis ilian bezonon uzi forton kontraŭ io, sen zorgi pri la sekvoj. Traflugis min la penso, ke, tiaetose, mankus malmulte ĝis ili povus mortigi, se nur troviĝus ĉe ili la uloj, kiuj volis alTurkiigi la knabon.

"Ne! Ne!" mi diris, ne vere krie, sed metante en tiujn vortetojn kiel eble plej multe da forto. "Ne tiel! Ne beste ni agu, sed home!" Ili konas kaj amas min. La kontakto inter ni estas tuja, ofte klarigoj ne necesas, sufiĉas la maniero min teni kaj paroli, por ke ili reagu responde al mia deziro. Ankaŭ ĉi-foje tiuj ecoj agis. Tuj etiĝis la ĝenerala sonaltecio, tuj la disaj movoj malrapidiĝis. La infanaj bestetoj rehomeiĝis kaj elmontris pretecon aŭskulti. Kiam mi rekomencis vorti, mi plej dolĉe, plej amike parolis. Samsente kun ili. "Mi komprenas vian reagon," mi diris, kaj miaj paroloj sonis malalte, sed klare. "Vi sentas bezonon krei kaj frapi, ĉu ne? Kiel mi komprenas vin! Sed vi scias same bone kiel mi, ke per tio ni sukcesos fari nenion helpan."

"Ni volas helpi al Ismet, ni ne akceptas, ke li foriru!" diris knabino.

"Kiel do ni povus fari, ke Ismet restu ĉi-lande?" demandis iu.

"Mi ne scias," mi respondis. "Sed ni havas iom da tempo. Ne morgaŭ li devos foriri. Pripensu la aferon. Eble vi trovos, kiamaniere superi la problemon."

Restis unu horo kaj duono, ĝis la labortago finiĝos. Mi min demandis, kion fari. Estis klare, ke la infanoj ne estis en etoso, en kiu ili povus labori. Kion ajn mi volus, ke ili faru, ili pli pensus pri Ismet ol pri la devaĵo. La sola maniero eliri el tiu problemo estis igi ilin fari ion rilatan al la samklasano. Mi elektis tiun vojon. "Nun ni ne faros, kion mi preparis por la resto de la tago," mi diris, "ni faros ion alian. Prenu paperon, kaj skribu, kial vi volas, ke la familio de Ismet restu nialande. Provu verki kiel eble plej bele kaj vortoriĉe. Sed ankaŭ kun plena vereco. Eldiru tute vere, kion vi sentas." Mi turnis min al Ismet: "Vi same faru: skribu, kial vi deziras resti ĉi tie." Kaj, mire, ĉar

mi antaŭe ne decidis diri tion, mi aŭdis min aldoni: "Se viaj verkaĵoj estos belaj, mi sendos ilin al la respondeca oficejo."

Paco revenis en la klason. Reaperis plena trankvilo. Al mia zorgado pri Ismet kuniĝis revenanta feliĉsento, dum mi rigardis iliajn kapojn direktitajn jen al la papero, jen al la fenestro, jen simple alten, serĉe al ideoj. Ĉiu infano videble funkciigis sian penspovon ĝispleje. "Kia eksterordinara lernantaro!" mi pensis. "Neniam mi vidis klason, kie ĉiu tiom amas ĉiun alian."

*

La infanverkoj estis eksterordinare bonaj. Mi sendis ilin al la oficejo, kiu okupiĝas pri la alilanda laboristaro. Kelkaj el tiuj verketoj, la plej bonaj, aperis en loka gazeto, kaj poste eĉ en la plej grava gazeto de la lando. Multaj transdoniĝis de loĝanto al loĝanto. Kiam iu radio-produktisto eksciis pri ili, li faris radio-elsendon pri Ismet kaj liaj samklasanoj. Iu urbano havis la ideon organizi petskribon al la respondecaj povohavantoj, kaj iu alia decidis sendi tiun ankaŭ al la ŝtatestro.

Amikeco povas fari mirindaĵojn. Ismet plu estas kun ni. Hieraŭ ni festis la renovigon de lia restadpermeso, kun multe da ridado, trinkado, ludado. Nun, tute trankvile, la klasanoj skribe respondas al mia demandaro pri la lasta naturscienca leciono. Mi rigardas ilin. Sento de granda feliĉo min envenas. Jes, ĉi tiu estas speciale bona jaro. Jaro plena je amo.

La forĵetito

Riĉjo ĉiam estis la plej bona amiko de Petro. Tamen, kiam diversaj knab-grupoj formiĝis en la klaso, ili apartiĝis. Petro aliĝis al la Superuloj, ĉar ili kontentigis lian deziron rigardi la mondon de supre. Riĉjo akceptiĝis en la Belan Fiŝaron, grupon malgrandan, kun membraro ĉefe eksterlandana. Ilia urboparto estis tre diversa: manlaboristoj proksimis al pur-manaj oficistoj, homoj riĉaj al senriĉaj, nacia loĝantaro al alilanda. La knab-grupoj organiziĝis laŭ tiu diverseco.

La Superuloj agis aĉe. Ili vortigis malamon al alilandaj laboristoj, kiam tiuj, surstrate renkontataj, aperis solaj kaj ne speciale fortaj. Ili ĵetis ŝtonojn al la fenestroj de domoj, kie judoj loĝis. Unuvorte, ili permesis al si ĉion povantan naski senton de supereco. Pri la malfeliĉo, perditeco, senhelpeco, kiujn ili kaŭzis, ili ne pli zorgis ol pri malpura gazeto delonge forĵetita.

Petro estis bonega sportulo, knabo kun multe pli granda forto ol ĝenerale troviĝas ĉe lernanto dekkvarjara. Post li la plej forta en la klaso estis Riĉjo. Tiu ne ŝatis la

Superulojn. Verdire, ili neniam akceptus lin. Ili malamis la afrikanojn, kaj en Riĉjo estis io afrika, la haroj, ekzemple, kaj ankaŭ io en lia ĝenerala koloro, tute ne nord-eŭropeca. La aliĝpeton de Petro la Superuloj akceptis, sed ne tuj. Liaj haroj ne tute similis al tiuj de Riĉjo, tamen ili aperis iom transmarulaj. Kaj sentiĝis malcerteco en la grupo, kiam iu malkaŝis, ke la familia nomo de lia patrino estas Pinhas. Tiun nomon li, kiel ĉiuj aliaj, opiniis portugala, pro la *nh* en ĝi. Estis multaj portugaloj en la lernejo, kiel en la urba laboristaro, kaj kelkaj havis nomon kun *nh*. Por la Superuloj, portugaloj estis bestoj.

Malproksime de la urboparto, kie tiu knabgrupo loĝis kaj fordonis sin al siaj agaĉoj, kuŝis juda enterigejo. Foje, dum libertago, la grupo decidis iri tien por plezurigi sin per disrompo kaj larĝavorte skribaĉi sian malamon al la judoj. Petro kuniris.

Irante tien kaj tien en la mortintejo, la knaboj ne rigardis la surskribojn. Multaj ja estis en la hebrea. Sed foje, kiam Petro pretiĝis por skribi vortaĉojn sur belan ŝtonon nom-memorige starantan super enterigito, li vidis ion, kio tute forprenis de li la povon movi sin, kaj eĉ pensi. Verdire, la ekmiro estis tia, ke li preskaŭ falis. Dum longa minuto li staris tie, kiel senvivulo. Lin plenigis sentoj malklaraj, sed disrompaj. Sub hebrea surskribo ja legeblis niaskribe la nomo de la mortinto: Emmanuel Pinhas.

Dum li tie staris, la grupo plu iris sian vojon en la mortintejo, lasante lin malantaŭe. Li sentis, ke li ne povos tuj rekuniĝi kun ĝi. Li eliris, penseme. Ne sciante ĝuste, kion li faras, kaj kial, li piedis direkte al la urbo, tra loko sendoma, nenion rimarkante, perдите en la pensoj.

Kiam unua ŝtono alflugis kaj aŭdeble falis tuj malantaŭ lin, li ekmiris. Sed kiam la dua frapis lian manon, venis tuj kompreno. Kaj li ekrapidegis for, dum la Superuloj malantaŭ li vortaĉis plejplej klare sian opinion: "Judo! Malverulo! Kaŝema besto! Venu ĉiuj, ni mortigu la aĉan kaŝ-judon!" Ŝtonoj pli kaj pli multaj falis ĉirkaŭen, unu aŭ du eĉ sur lin, feliĉe ne sur gravan parton. Dank'al tio, ke li estis la plej bona sportulo el la klaso, li sukcesis forrapidi. Se, antaŭe, la grupo atendus iom pli longe antaŭ ol sendi la unuan ĵetaĵon, kaj do estus pli proksima, li ricevus tiom da ŝtonoj, ke eble li jam estus morta. Sed ili tro frue, de tro malproksime komencis, tiel informante lin pri sia malboncela veno. Li plene uzis sian nekomunan rapidecon por lasi ilin pli kaj pli fore. Post dek minutoj li eniris la malnovan parton de la urbo, kie la multaj mallarĝaj stratetoj ebligis al li malaperi el ilia vidado. Kiam sur pli larĝa strato li renkontis aŭtobuson ekirantan, li enrapidis en ĝin. Nun li estis certa, ke li alvenos hejmen antaŭ ol ili revidos lin.

Sed tuj post la enhejmiĝo, li bezonis kontentigi gravan scivolemon. Lia patrino laboris super vesto en la sidĉambro.

"Patrineto, ĉu vi estas kristana?", li demandis eĉ antaŭ ol eksidi. Sed ŝin zorgigis io pli fakta:

"Kio okazis al vi? Rigardu vian manon..."

"Knaboj ĵetis ŝtonojn al mi! Ili diradis, ke mi estas judo."

Ŝi direktis al li miran rigardon, en kiu legiĝis ankaŭ timoplena malcerteco. Kaj zorgemo. Ŝi demandis:

"El kie ili prenis tiun ideon?"

Petro rakontis. Li sentis sin aĉe. Lia patrino sciis nenion pri la knabgrupoj kaj lia membreco en la Superuloj. Estis ege malfacile raporti pri iliaj faraĵoj en la juda mortintejo. Sed li sentis bezonon pensi klare, kaj por tio necesis scii, kaj por scii, diri la veron. Kio okazis post lia longa senmova rigardego al la mortulŝtono, li ne sciis ĝuste, sed facile povis bildigi al si. Plej verŝajne knabo rimarkis, ke li forlasas la grupon, memoris, kie li antaŭe staris kiel mirfrapito, reiris tien kaj komprenis pro la skribita nomo.

"Jes, mi estas kristano," ŝi fine respondis lian unuan demandon. "Sed mi naskiĝis juda. Mi kristaniĝis, ne pro vera kredo, nur pro timo. En la tempo de Hitler, tiom da familianoj..." Tro fortaj sentoj malhelpis ŝin paroli plu. Post minuto ŝi tamen rekomencis: "Vi scias, ĉu ne?, ke filo de juda patrino estas judo, laŭ la juda pensmaniero, kaj ankaŭ laŭ multaj judmalamikoj. Vi do estas judo."

"Kial vi neniam diris al mi?"

"Mi esperis, ke nescio restigos vin ekster la aĉaĵoj, kiujn travivis nia popolo. Mi komprenas nun, ke ne eblis. Mi agis malĝuste..." Sekvis longa senvorta daŭro.

"Mi bezonas esti sola," Petro fine diris, kaj eliris el la domo.

Dum pli ol du horoj, li piediris sencele sur la stratoj, provante klare pensi, sensukcese. Jam estis nokto, kiam li decidis viziti Riĉjon. Soleco ne estis facile elportebla, sed reveni hejmen li ne povis tuj. Riĉjo akceptis lin plej amike. Tamen, la unua demando de Petro povis nur mirigi lin:

"De kie vi ricevis tiujn afrikecajn harojn?"

"Mian patrinon naskis virino, kiu... kiel diri?... tro amis virojn. Kiam ŝi loĝis en Antverpeno, ŝi iris kun ĉiaj, maristoj ĝenerale. Mia patrino neniam sciis, kiu estas ŝia patro; plej verŝajne afrika maristo. Sed kial vi demandas? Kial vi venis al mi?"

"Mi bezonas paroli, kaj al nenies vera amikeco mi povas kredi, krom al la via. Rigardu mian manon. Tion faris ŝtono. La Superuloj elĵetis min el la grupo, per ŝtonoj kaj vortaĉoj, ĉar mi estas judo."

"Judo, vi, ĉu vere? Kaj tamen membro de la Superuloj!"

"Mi ne sciis. Pri mia judeco mi eksciis nur hodiaŭ. KREDU min, mia tuta mondo disrompiĝis, kiam tiu novaĵo falis sur min..."

Li klarigis la aferon. "Kion mi faru nun? Ili kredas, ke mi vole kaŝis mian judecon, ke mi estas aĉulo, iu nenivalora, same aĉe aganta rilate al ili, kiel al la judfratoj. Mi ja partoprenis en la malpurigo de la juda mortintejo, kiel mi antaŭe ŝtonrompis kun ili judajn fenestrojn. Kiel mi povis? Diru al mi, Riĉjo. Kiel mi povis agi tiel sense, tiel nehome?"

"Pri tio pripensu mem. Ne mi povus respondi. Se vi sciis, kiom mi malfeliĉis, kiam vi aliĝis al via fia grupo! Mi kontentas pri tio, kio okazis. Vi nun certe forlasos la idearon de la Superuloj, komencos kompreni, ke superi ne estas io necese bona, kaj ke malsuperuloj indas esti home rigardataj. Tiel mi pli ŝatos amiki al vi. Pri la Superuloj, kion mi povus diri? Mi ne scias. Eble ili faros nenion. Vi ja estas la plej forta el la klaso!"

"Sed kontraŭ ok knaboj decidintaj malbonfari, kion eĉ fortulo povas?"

Senvorteco plenigis la ĉambron. Riĉjo estis la unua, kiu reparolis:

"En la Bela Fiŝaro ni estas nur kvin, sed kun vi ni estos ses, kaj mi estas preskaŭ same forta kaj rapida kiel vi. Nia grupo enhavas nur sentimulojn, male al la Superuloj, kiuj bezonas kredigi sin superaj nur, ĉar ili konas sin timemaj, nur grupe povantaj superi. Ili frapas nur solulojn, kaj se eble pli etajn. Estas pli facile ŝtonrompi fenestrojn aŭ sur domo larĝavorte skribaĉi ol akcepti milit-renkontiĝon kun sentima seso. Kiam ili sciis, ke nia grupo staras kun vi, ili perdos ĉian deziron fari al vi malbonon. Tamen, zorgu neniam esti sola ĉe pluraj el ili."

Liaj paroloj montriĝis ĝustaj. La Superuloj nenion faris al Petro, aŭ pli ĝuste nur laŭ timula maniero, ekzemple per leteraĉoj. "Sed," la knabo diris, raportante al mi pri tiuj travivaĵoj, "tio ne helpis min eliĝi el mia problemo, la problemo pri mi mem, pri mia esto. Je la aĝo de dek kvar jaroj mi senvole judiĝis, kaj el tiu ŝanĝo de esto mi ĝis nun ne trovis, kion fari. Ĉu vi povos helpi min?"

haroj: la milionoj da treege maldikaj kaj mallarĝaj beligaoj, kiujn naturo kreskigas sur ni, ĉefe supre, sed ankaŭ diversloke

hebrea: lingvo de Israelo, de la Biblio

judo: membro de la popolo, kiun komencis Abrahamo, Isaako (Jichak) kaj Jakobo

kristano: sekvanto de la instruoj de Kristo

laŭ: sekvanta

nordo: Eŭropo kuŝas je la *nordo* de Afriko

ŝtono: nerompebla aŭ nur malfacile rompebla naturaĵo; ŝtonoj, jen tre etaj, jen grandaj, ofte troviĝas sur kaj en tero, oni povas fari el ili domojn.

Ĉu Tamara edziniĝos?

Al Tamara ĉiam plaĉis viroj el malproksimo. Kial? Ŝi mem ne povus diri. Sed la kunstudantojn el sia Eŭropo ŝi neniam trovis interesaj, dum tiuj kun ĉina, afrika, indiana deveno facile enportis ŝin en amon. La junulo, kiu ĉi-foje eniris la trinkejon, aperis hinda. Nur unu rigardo sufiĉis, kaj ŝi jam ne plu estis si mem, Ŝi ne plu estris sin. Ŝi trovis lin pli bela ol iun ajn viron ĝis tiam renkontitan. La sentoj, kiujn li estigis, estis dismoviĝaj kaj malklaraj, ŝi ilin ne komprenis, sed ili ege fortis. Kio ĝuste okazas, ŝi ne sciis, ne povus diri. Io, kio ne estis ŝi, estris ŝin. Ne gravis, kio. Eble lia beleco. Gravis nur, ke li aperas tiel aminda. Ŝi ne povis ne ami lin. Nova-foje Tamara unua-rigarde enamiĝis, nova-foje ŝin plenigis la ĉielen-leviĝo, kiu samtempe igis ŝin feliĉega, kaj malfeliĉa. Verdire, eĉ per la mal-feliĉeco ŝi plezuris. Pri Tamara neniam estis certe, ĉu ŝi vivas la vivon, la veran vivon, aŭ sento-riĉan rakonton, kiun ŝi senvorte rakontas al si.

La trinkejo estis plenplena. Ĉu la am-preteco de Tamara movis lin, aŭ ĉu li elektis tiun lokon senpripense, nur ĉar li ja deziris ie sidi, ni ne povas scii, sed ĝuste al ŝia tablo li direktis sin.

"Ĉu vi permesas, ke mi sidu ĉi tie?"

Al Tamara estis tre malfacile ne respondi: "Mi *rekomendas*, ke vi sidu ĉe mi. Mi *petegas* vin ĉi tie eksidi. Mi plej forte *deziras*, ke kun mi vi sidu..." Ŝia tuta estaĵo volis diri tiajn vortojn. Sed ŝi sukcesis ilin ne eligi. Metante en siajn rigardon kaj parolojn kiel eble plej multe da ina amindeco ŝi respondis: "Jes, mi permesas. Se vi bonvolos diri vian nomon."

"Mi nomiĝas Raŝid," li diris, kaj tiuj simplaj vortoj sonis tiel bele, lia rigardo aperis tiel am-dona, ke refoje ŝi perdiĝis en maron de neestreblaj sentoj, plezurige malklaraj. 'Mi falas en la ĉielon', ŝi diris al si, sen zorgi pri tio, ĉu la ideo "fali" povas aŭ ne kun-esti kun la ideo "ĉielo". Ŝi ja ne troviĝis en mondo de pensado, sed de sentoj, kaj sentoj povas samminute iri supren kaj malsupren, eĉ se la plimulto el la viroj tion ne komprenas.

*

Li venis el Kenjo, kie liaj gepatroj havis ege sukcesan komercon. Riĉegaj ili estis. Granda parto de la komerco, en Orienta Afriko, estas en la manoj de homoj kun hinda aŭ pakistana deveno. La gepatroj de Raŝid jam ricevis tiun mirinde funkciantan komercon de siaj gepatroj, ankaŭ kiuj ricevis ĝin de la propraj gepatroj. Jam jardekojn mono multiĝis en tiu familio.

Kiam, kelkajn monatojn pli poste, li diris, ke li volus edziĝi al ŝi, ŝi ne povis diri "ne". Ne pro lia riĉeco, nur pro li, pro lia tuta personeco. Tamen, se diri la veron, la ideo edziniĝi en riĉegan familion enhavis nenion malplaĉan.

Tuj post kiam la kursoj finiĝis, li sciigis al ŝi, ke li reiros hejmen por la libertempo.

"Kial ni ne geedziĝus antaŭe? Tiel mi irus kun vi," ŝi diris.

"Ne eblas. Mia familio ne konsentus. Mi devas prepari ilin. Nia vivo estas iom malsimpla pri tiaj aferoj."

"Se vi alvenus kun mi, vi povus prezenti min."

"Ke ni vojaĝus kune, tio estus neakceptebla por ili; geedziĝo devas esti organizita de la familioj. Se ili ekscius, ke ni kunkuŝis, kaj vi ne plu estas 'pura', en ilia pensmaniero, ni devus por-ĉiame apartiĝi. Ne, mi unue iru kaj rakontu pri vi. Necesas prepari la kampon."

*

Kiom da fojoj ŝi telefonis al Kenjo, ŝi ne povus diri, sed ili ŝajnis al ŝi nekalkuleble multaj. Neniam ŝi sukcesis paroli al li. "Li estas for", estis la ĉiama respondo. Se ŝi petis klarigon, aŭ demandis, kiam aŭ kie trovi lin, la alparolato uzis ian nekompreneblan formon de la angla, kiu lasis ŝin senvorta. Tamen ŝi foje ricevis poŝtkarton de li el Dar-es-Salamo, en Tanzanio. "Mi pensas pri vi", ĝi diris, senplue.

Iun tagon ŝi ekvidis lian amikon Simhan. "Kio okazis al Raŝid? Ĉu vi scias? Kiam... kie... kial...?" Ŝi ĵetis al li ĉiujn demandojn samtempe kun tiel forta sci-deziro, ke li sentis ĉiun kiel frapon, li sentis sin boksisto falige frapata de la kontraŭboksanto. Li ne sciis, de kie komenci.

"Mi alvenis hieraŭ," li diris, kio tute ne interesis ŝin. "Bonvolu iom malpli rapide paroli. La vojaĝo estis longa. Mi ne povas pensi klare."

"Sed mi *devas* scii, mi *bezonas* scii, se mi ne scios pri Raŝid, mi mortos! Ni ja devas geedziĝi."

"Jes, mi scias. Sed estas bone, ke vi ne edziniĝis jam."

"Kial?"

"Vi malfeliĉus."

"Pro kio?"

"Ĉar Raŝid... Mi ne dirus, ke li vin ne amas, sed verŝajne li amas sian riĉon pli ol vin."

"Kial vi tion diras?"

"Aŭskultu. Se li amus vin, li estus nun kun vi ĉi tie. Sed kiam li provis paroli pri vi sia-hejme, liaj gepatroj tuj interrompis lin. 'Vi edziĝos al knabino el nia popolo', ili diris. 'Ni ne konsentas pri io alia'. - 'Mi ne zorgas pri via konsento', li respondis. 'Mi reiros Eŭropon, kaj edziĝos. ŝanĝas nenion, ke vi ne akceptas'. - 'Ĉu vere?', la patro diris, 'ĉu vere ŝanĝas nenion? Reiru do tien kaj prenu ŝin kiel edzinon, se vi deziras, sed tiam vi ne plu estos nia filo. Kaj al ne-filoj ni ne lasos la komercon, kun la multa mono, kiun ĝi ĉiutage alportas'."

"Ĉu vi diras al mi, ke Raŝid tion akceptis? Ke li ne trovis la forton diri 'ne'? Ke li ne respondis: 'mi laboros, ŝi laboros, ni iel elturniĝos, sed ni vivos kune'? Se ne tion, kion do li respondis?"

"Li diris: 'mi bezonas pripensi', kaj forflugis al Dar-es-Salamo."

"Kaj kio okazis tie?"

"Tie? Nenio. Li restis kelkajn tagojn, kaj poste revenis hejmen. Li diris al sia patro: 'Pardonu min, patro, mi decidis plu esti via filo. Kion vi diris, tio certe estas ĝusta. Edziĝi al iu ali-kultura ne sukcesus'."

Tamara senkoloriĝis. Ŝi ne dankis Simhan, ne diris: ĝis revido. Ŝi senvorte turnis sin kaj iris for.

*

Unu monaton poste ŝi sidis en la sama trinkejo, kiu tiom plaĉis, ĉar en ĝin venadis multaj junuloj studentaj en la universitato. Ŝi sentis sin malfeliĉa. Kaj samtempe akceptis la opinion de Simha, ke se Raŝid estas tia ulo, kia li montriĝis, ŝi certe malfeliĉus kun li. Ŝi provis forĵeti lin el sia pensado, sed ne sukcesis.

Kaj jen la pordo malfermiĝis. Envenis alta knabo, afrikano, sed ne tute simila al la plimulto el la afrikanoj. Ĉu eble etiopia? Aŭ iu el la Kariba Maro, kun samtempe afrika kaj azia, eble eĉ indiana deveno? Kiel bela li estis! Kiel forta! Ene de Tamara ĉio moviĝis neestreble.

Kiel plej ofte, la trinkejo estis homplena, sed tamen jen kaj jen seĝoj haveblis. Ĉu ŝi faris moveton de la mano, signifan pri venigo? Aŭ ĉu rigarde ŝi montriĝis invita? Fako estas, ke li proksimiĝis al ŝi.

"Ĉu ĉi tiu sidloko estas libera?" li demandis.

"Jes kaj ne," ŝi respondis.

"Kion vi volas diri? Ĉu vi atendas iun?"

"Ho jes!", ŝi diris, kaj ŝi disradiis amon sone kaj rigarde. "Ho jes, mi atendas iun, sed vi tamen povos sidi ĉe mi, se vi diros vian nomon."

"Mi nomiĝas Ĝo," li diris, ne tre certa pri tio, kion ŝi celas. "Kiun vi do atendas, ĉu amikinojn same belan kiel vi, aŭ malbelan grand-aĝulinon, pri kiu vi okupiĝas publik-serve?"

Ŝia respondo lasis lin dum minuto senvorta.

"Vin, Ĝo" ŝi diris. "Mi atendis *vin*."

Terura novaĵo

Estis pri-plorinda novaĵo. Vi scias, ke mi decidis diri al miaj infanoj, ke mi foriros. Kiam mi decidis, mi tute ne imagis, ke estos tiel malfacile. Fakte, en la momento, kiam mi volis iri paroli al ili, mi eksciis, ke mi ne povas.

Komprenu min. Ĉu eblas al homo normalkora aliri la gefilojn kaj diri: "Mi havas novaĵon por vi. Baldaŭ mi foriros. Baldaŭ via patro forlasos ĉi tiun domon por ĉiam..."? Kiel oni povas diri tion al infanoj, kiujn oni amas? Kaj tamen mi devis. La afero estis decidita. Mi devis ĝin fari.

Mi komence parolos al la knabino, mi decidis. Ŝi estis en sia ĉambro, faranta iun laboron por la lernejo. Ŝi rigardis min per miro-plenaj okuloj. Tute certe ŝi sentis, ke io estas ne-normala. Mi aliris ŝin. "Klara," mi diris, "mi... devas informi vin pri io... Malĝojiga novaĵo, tre malĝojiga". Ŝia vizaĝo ŝanĝiĝis: mira antaŭ unu momento, ĝi nun fariĝis zorga.

"Vi scias... Certe, vi rimarkis, ke via patrino kaj mi... nu... nia rilatado ne estas bona. Ni... Kiel diri?... Ni ne plu sukcesas rilati ame. Ni... Estas malfacile por unu vivi kun la alia, tagon post tago, horon post horo, minuton post minuto. Via patrino estas tre bona virino, helpema, bonkora, klarpensa. Iu-maniere, mi plu amas ŝin. Sed kunvivi en la sama domo ne plu estas eble. Ni decidis, ke mi foriros... Ne timu, mi revenos vidi vin, ludi kun vi, paroli kun vi. Kiel eble plej ofte. Sed mi loĝos en alia domo".

Ŝi rigardis min. Sub tiu rigardo, mi sentis min senkorulo seniganta senhelpan hometon je la plej ŝatata havaĵo.

"Se vi kaj patrino tion decidis..." ŝi komencis, kaj estis io tre malĝoja en ŝia voĉo. Mi rimarkis, ke ŝi emas plori, sed kun granda peno sukcesas superi la ploremon. Ŝi aldonis nur: "Nu, estas tiel". Kaj post ekrigardo al mi, en kiu nek malamo, nek timo vidiĝis, sed nur malfeliĉo, ŝi el sia ĉambro eliris, kaj tuj poste el la domo.

Mi sentis min ege laca, kaj nur duono de la devo estis farita. Mi pli antaŭ-timis la intervidon kun Alano, la knabo, ĉar li estas pli juna kaj pli sentema. Ankaŭ pli malkaŝema, pli ema sin esprimi.

Kiam mi aliris lin, li ludis per siaj etaj aŭtoj. Mi decidis fini la dolorigan momenton kiel eble plej tuje. "Mi venas sciigi ion tre gravan al vi", mi diris per voĉo plej serioza. La veturiletoj tuj haltis, kaj Alano tuj direktis al mi siajn belajn, blujn okulojn, tiom plenajn je trankvila amo, ke mia koro ekdoloris. Li havas al mi grandegan amon. Mi estas por li la Patro kun granda P. Patro estas, lia-pense, plej aminda fortulo: ulo virega, havanta la povon ĉiam ĉion superforti.

Kaj nun mi bat-faligos tiun ideon pri mi. Miaj vortoj estos bato, post kiu nenio plu restos el tiu patro-bildo. Ĉu estas bone, ke tiu imagata, sed amata, fortulo subite perdu la ekziston? Ĉu Alano ne estas tro malforta por supervivi tian baton?

Ree mi kunigis la tuton de miaj troveblaj fortoj kaj ekparolis: "Alano, mi baldaŭ foriros. Mi ne plu vivos kun vi ĉi tie. Mi ne plu loĝos ĉi-dome".

La knabo min rigardis kun esprimo sindemanda. Kaj li ekridis. Mi atendis kion ajn, sed ne tion. Li ne akceptis min serioze! Por li, patro estas tiel klara, natura, ne-forigebla duono de amata paro, ke tiu duono ne povus serioze foriri, lasante la alian duonon sola. Ke mi foriru, tio estas tute simple nebla. Tiu diro de la patro povis esti nur luda.

"Alano, mi ne ŝercas, ĉi tio ne estas ludo. Mi komprenas, ke vi ne kredis min tuj, ĉar vi tutforte esperas, ke mi ne diris la veron. Sed estas vere, Alano, mi foriros. Vi restos ĉi tie kun patrino kaj Klara. Kaj mi ne plu vivos kun vi. Mi..."

Li sentis nun, ke ne temas pri imaga rakonto, ke mi diras puran veron. Sed li ne povis akcepti ĝin. Li rigardis min. Li subite iĝis senkolora. Li aperis tiel eta, senhelpa, ke mi sentis, kvazaŭ la tuta ĉambro turniĝus ĉirkaŭ mi. "Mi mortigis lian koron, lian ĝojon, eble lian povon ami kaj feliĉi", mi pensis.

Alano ekkriis. Li elmetis siajn etajn brakojn, siajn etajn manojn, batis min kun fortega, longa, nehoma krio, kaj post kelkaj ekbatoj al mi, forkuris ploregante.

Mi staris tie, senpensa, sensenta. Mi ne imagis, ke eblas senti tian pezon de malfeliĉo. Mi sentis min la plej malaminda dolorigisto en la mondo. Mi ne plu sciis, kiu mi estas, kion mi faru, kien direktiĝas mia vivo-vojo. "Ĉu vere tion vi volis?" mi demandis al mi. Sed de nenie venis respondo.

Telefona registrilo

- Kion vi diris? Ke telefona registrilo estas la kaŭzo de via nuna feliĉo, ĉu? Tion mi ne povas kompreni. Mi malŝategas tiujn maŝinojn. Al mi tute ne plaĉas paroli, ne al homo, sed al aĵo. Kiam tia maŝino aŭdigas sian ripetaĵon kaj invitas min diri mian diron, mi ĉiam sentas min senhelpa; mi neniam scias, kiel vortigi la aferon, pro kiu mi telefonas.

- Multaj samsentas kiel vi. Sed vi komprenos tuj, kial por mi estis alie. Vi miris pri mia reedziĝo, ĉu ne?

- Verdire...

- Via miro estas tute natura. Mi reedziĝis ne vere longe post la forpaso, t.e. ... ni ne timu la ĝustajn vortojn ... post la morto de mia edzino. Estas kompreneble, ke ĉiuj miaj amikoj miris.

- Ni miris, ĉar ni konis Evan. Ni vidis, kiom vi amas ŝin. Kaj ni opiniis, ke... Mi ne scias, kiel diri...

- Vi estis certaj, ke mi ne dezirus tiel rapide rekomenci rilaton kun virino, ke neniu povos okupi en mia vivo la lokon, kiun havis Eva, ĉu ne?

- Ĝuste.

- Ankaŭ mi estis certa pri tio. KREDU min : tiu, kiu plej miras pri la afero, tute certe estas mi. Mi ne rekonas min mem. Se ne ekzistus telefonaj registriloj ...

- Malŝatindaĵoj!

- Neniu ŝatas ilin, sed ili estas tre utilaj. Dum Eva estis sana, mi ne bezonis tian ilon: se iu telefonis, ĉiufoje respondis ŝi. Sed kiam ŝi malsaniĝis, ne plu estis eble, tial mi aĉetis unu.

- Kaj Lidja telefonis, kaj trovis, ke vi sonas tiel bela registrile, ke ŝi enamiĝis al vi, ĉu? Ho, pardonu! Mi agas kiel sensentulo. Mi ride parolas pri aferoj, kiuj tute ne ... en kiuj malfeliĉo ... kiel diri? Mi ne agas tre amike al vi.

- Eble se vi malpli interrompus... Mi ne bezonas diri, kiel granda malfeliĉ-frapo estis por mi la malapero de Eva. Mi amis ŝin, kiel nemultaj viroj amas virinon. Eble tio estas troigo, sed tiel ŝajnis al mi, al ni: nia amo estas sensimila. Tial mi opiniis, ke mi neniam povus ami alian virinon samforte. Kaj tamen...

- Tamen...?

- La alveno de Lidja en mian vivon montris tiun opinion malĝusta. Sed ne estas facile ŝanĝi la bildon pri si. Tial mi dankas, ke vi bonvolas aŭskulti min. Vortigi siajn pensojn helpas...

- Helpas pri kio?

- Helpas kompreni. Akcepti sin mem. Akcepti, ke oni estas alia ol oni kredis. Vi komprenas, mi ne plene repaciĝis kun la fakto, ke mi povas ami per tiel granda amo iun alian ol Evan. Ke eblas ami du virinojn, tio ankoraŭ ŝajnas al mi miriga. Dum la tuta tempo, kiam Eva vivis, ŝi estis por mi la sola virino en la mondo. Al multaj viroj, onidire, unu virino ne sufiĉas. Mi funkcias male : dua por mi estus tro. Tial, verŝajne, mi kredis, ke neniam alia ino sukcesos okupi miajn pensojn.

- Sed tion sukcesis Lidja, kio montras, ke oni neniam konas sin mem tute.

- Ĝuste. Kiam Eva forlasis nian mondon, mi travivis ege malfacilan tempon. Lidja remetis brilon en la senvarman, seninteresan, senvivan ekziston, kiu estis mia ĉiutagaĵo, ek de kiam mi iĝis senedzina.

- Jes. Mi tion povas kompreni, ĉar Lidja estas mirinda persono. Sed kiel ĉio ĉi rilatas al telefona registrilo?

- Kiam estis klare, ke Eva ne plu longe vivos, kaj precipe post kiam ŝi forlasis nin, min kaptis malespero. Mi komencis malbone labori. Mi ne plu sukcesis direkti mian penson al tio, kion mi faras. Mia pensado ree kaj ree perdiĝis en ian mortomondon. Mi estis sensenta, mi agis maŝine, nenio plu vivis kaj klaris en mi. Ideoj pri memmor-tigo envenis min. Eble, se ne vivus la gefiloj, mi sendus min morten. Sed pro ili mi ne povis. La ideo lasi ilin solaj ne estis elportebla. Ili jam ege malfeliĉis pro la manko de patrino, kiel mi povus senigi ilin ankaŭ je patro?

- Tion mi komprenas. Estus nehome.

- Jes, tamen la deziro forlasi ĉi tiun mondon kun ĝia tropleno da zorgoj fojfoje estis malfacile forigebla. Mi devis kunigi ĉiujn miajn fortojn por ne allasi, ke ĝi superu mian sanan pensadon, mian senton pri respondecoj. Miaj gefiloj estas ankoraŭ junaj, sed ili sentis, ke mi trairas tre malfacilajn tagojn, kaj ili decidis agi.

- Kion ili faris?

- Ili metis alian diraĵon en la registrilon, kaj, kompreneble, nenion diris al mi pri tio. Vi scias, se oni enmetas ion novan, oni per tio mem forigas la antaŭan parolaĵon, kiel ĉe plej ordinara kasedo. Tiu registrilo ja uzas ordinarajn kasedojn.

- Kaj kion ili surkasedigis?

- Parolis Korinjo, la knabino. Ŝi diris: *"Mia patro ne povas respondi al vi. Li povas fari por vi nenion. Nia patrino mortis kaj li estas tre malfeliĉa. Bonvolu lasi lin en paco."*

- Nekredeble!

- Tamen vere. Kiam Lidja foje telefonis por iu ofica afero, ŝi aŭdis tiun respondon, kaj trovis ĝin tiel pensiga, ke ŝi deziris ekkoni la knabinon, kiu ŝin diris. Ne estis malfacile trovi, kie mi loĝas. Ŝi do venis ĉi tien je la horo, kiam la infanoj revenas el la lernejo. Ŝi restis ekstere, nur rigardis. Ŝi volis vidi la etulinon. Ŝi tion faris plurtage sen diri ion, sen prezenti sin. Foje tamen ŝi aliris Korinjon kaj igis ŝin paroli, demandis, ĉu la registrilan diraĵon surkasedigis ŝi. Korinjo respondis, ke jes, kaj tiel ili amikiĝis. Ofte infanoj trovas, ke neniu povas preni la lokon de patrino, kiu malaperis. Sed Lidja estis tiel helpa, simple, senprobleme, ke la infanoj akceptis ŝin. Ili bezonis virinon, kiu estu, ne la patrino - estus neeble - sed iu, kiu iom agas kiel patrino.

- Jes, tio estas tute natura.

- Lidja laboras en komercejo. La kaŭzo, pro kiu ŝi telefonis la unuan fojon estis, ke ŝi bezonis fakan helpon de mia oficejo; ŝi do devis rilati kun mi. Sed sen la interveno de la infanoj la kontakto verŝajne estus nur telefona; tute ne necesis, ke ni vidu unu la alian, por ke mi havigu al ŝi, kion ŝi bezonis. Mi opinias, ke ŝi unue enamiĝis al miaj gefiloj. Tio igis ŝin deziri ekkoni min: ŝi trovis ilin tiel karaj, ke ŝi pensis, ke verŝajne ankaŭ la patro amindas. Tuj kiam mi vidis ŝin, mi sentis ian kunecon. Mi sentis, ke ŝi komprenas la malfeliĉecon de mia sencela, senkolora ekzisto. Mia sento ne malveris. Ŝi montriĝis aparte mirinda kunparolanto, komprena, kunsenta, helpa. Kaj ŝajnas, ke ankaŭ mi havigis ion al ŝi... Verdire, tion mi ne komprenas. Jam ke Eva min amas, mi ne komprenis. Ke ankaŭ Lidja povus ami min, estas eĉ pli nekomprenebla. Sed kial voli kompreni? Fakto estas fakto. Kaj fakto estas, ke ŝi amas min, kaj mi ŝin. Jen. Kiel vi vidas, mian eliron el malfeliĉo - eĉ se ne tuta, tio ne eblus - mi dankas al registrilo.

- Mi dirus pli ĝuste: al via filino.

- Certe, sed sen la registrilo, la renkonto kun Lidja neniam okazus. Tiuj maŝinoj povas esti pli homaj ol vi opiniis. Eble ne estas bone ilin senpripense malŝati.

Ĉu ni kunvenis vane?

- Kiel vi povas scii, ke ili ne estas el la konferenco? - ŝi demandis, aludante la grupon, al kiu ili aliĝis en la muzeo.

- Laŭ la vizaĝoj. Estis turista grupo usona. Internacia turismo komencas disvolviĝi ĉi-regione.

- Kial vi diris: "laŭ la vizaĝoj"? Ĉu vi konas ĉiujn vizaĝojn de la konferencanoj?
 - Eble ne ĉiujn, sed la plimulton. Mi kompreneble ne scias, kion faras tiu aŭ alia persono. Ekzemple, mi scias, ke vi estas deleitino, sed el kiu lando, mi ne povas diri.
 - Estas eksterordinare! Pli ol cent landoj estas reprezentataj ĉi tie, kaj ĉiu delegitaro havas minimume kvin membrojn, multaj havas ĝis dek aŭ dek du. Devas esti 700 delegitoj, plus la interorganiza sekretariejo, plus la sovetiaj helpantoj! Kiel vi povus koni tiom da vizaĝoj?
 - Estas nia profesio, ĉu ne? Ni lernas havi specon de fotografia memoro. Fakte ni studis la fotojn de la ĉeestontaro dum pluraj semajnoj antaŭ ol veni Alma-Aton.
 - Ĉu vere oni povas lerni memori vizaĝon?
 - Ho jes! Ne nur vizaĝon, sed la tutan korpon. Ni lernas analizi la trajtojn dum rigardado. Tio fakte fariĝas reflekso, kaj oni trejnas nin ilin memori. Finfine, ne estas pli malfacile ol lerni parkere frazon de poezio aŭ de kanto.
 - Mirinde! Mi ne sciis pri tio, - mensogis Ĝoja, kiu perfekte konis tiujn teknikojn, plurfoje menciitajn de la edzo. Kaj ŝi aldonis:
 - Via laboro estas plena je respondecoj. Fakte devas esti nefacile.
 - Vi pravas. Multaj ne suspektas la amplekson de niaj respondecoj.
 - Kaj kiam okazis krimo, kiel ĉi-foje...
 - Des pli strange impresas, efektive. Tion bone scias mi. Kiam tio okazis, estis mia vico deĵori ĉe la enirejo de la koridoro, ĉe kiu troviĝas la ĉambro, kie S-ro Kertsch estis murdita.
 - Ĉu vere? Terure! Ĉu tio ne malhelpas vin dormi?
 - Feliĉe, ne. Mi havas tre bonan dormon. Eble ĉar mi scias, ke mi povis nenion fari por malebligi la krimon.
 - Tamen...
 - Jes, kompreneble, mi pensas pri tiuj posttagmezo kaj vespero pli ofte ol pri aliaj. Sed...
- Dum li lasis ŝvebi la frazon nefinita, Ĝoja ekhavis ideon.
- Mi admiras vian egalanimecon, - ŝi diris. - Por mi estus ege maltrankvilige, sciante pri la sovetia kontrolmanio...

- Tion ni ne troigu, - la norvega gardisto konsilis, kun rideto memfida.
- Tamen la ideo, ke televida kamerao rigardas ĉiun vian movon... - Ĝoja mensoge prononcis.

Ŝi vidis lin paliĝi.

- Kion vi celas? - li demandis, unufoje perdante iom el sia aplombo.
- Nu, vi scias, ĉu ne?, ke en la muro, kiu rigardas al la enirejo de la gravula koridoro, troviĝas kamerao, kiu ebligas al la sovetiaj aŭtoritatoj kontroli, kio tie okazas. Tiel ke se la gardisto forlasus sian postenon...
- Ĉi-foje, li iĝis kadavre pala, tiagrade, ke Ĝoja sentis glacian sensacon laŭ la spino: ŝi ne imagis, ke ŝia ruzo donos tian rezulton.

- Se la gardisto forlasas la lokon... - li murmuris kun tremanta voĉo.

Iu vere malsama

- Kio okazis, Jano? Ĉio estis facila kaj agrabla inter ni. Ni ridis kune, ni estis feliĉaj, ni deziris esti tuttempe unu kun la alia. Ni amas unu la alian. Sed via sinteno ŝanĝiĝis. Kio okazis?
- Se mi rakontos, vi rigardos min freneza.
- Kial do? Mi scias, ke vi ne estas freneza. Mi konas vin jam longe nun. Kaj profunde en vi, vi scias, ke vi devos diri al mi ...
- Vi pravas. Mi ne rajtas kaŝi la veron. Sed kiel klar-igi?
- Diru do, kiam ĝi komenciĝis.
- Kio?
- Tio, pri kio vi devas rakonti. Ĝi certe havis komen-con. Vi eksciis ion, aŭ okazis io al vi, aŭ io simila.
- Ĝi komenc-iĝis antaŭ mia naskiĝo.
- Temas pri via patro, ĉu ne? Vi ĉiam sukcesis ne paroli pri li. Kiam mi demandis, vi neniam respondis klare. Kien li mal-aperis?
- Mi ne povas diri, vi ne kredus min... Kaj tamen... Nu... Eble vi pravas. Eĉ se vi ne kredos min, prefere mi diru, kiel ĉio komenciĝis por mi.
- Ĝuste.
- Nu, mi estis eta infano, kiam mi ekkomprenis, ke mi vidas pli ol la aliaj.
- Vidas pli... kion?
- Kolorojn, ekzemple. Mi vidas kolorojn, kiujn neniu vidas.
- Ne estas eble. Ĉiuj koloroj estas konataj. Tio estas scienca fakto. Al sciencistoj estas klare, ke ne povas esti manko en ilia listo de koloroj.
- Via respondo signifas, ke, por vi, aŭ mi diras mal-veron aŭ mi estas freneza, ĉu ne?

- Jano! Ne tion mi volis diri. Mi... mi... mi nur provas kompreni. Ankaŭ vi devas konsideri miajn mal-facil-aĵojn. Klarigu plu.
- Mi ne povas klarigi. Estas simpla fakto. Vi ne povas priskribi koloron al nevidanto, ĉu? Estas same. Sed ankaŭ multon alian mi vidas.
- Kion, ekzemple?
- El la homoj elvenas speco de lumo. Kolora. Kiel klarigi? La korpoj disradias ion, kion vidas mi, sed ne la aliaj.
- Kiam vi rigardas min, ĉu vi vidas tiun... tiun ĉirkaŭlumon?
- Jes.
- Kia ĝi estas?
- Bela, ĉar via koro estas bona. Sed nun ĝi enhavas ian apartan koloron, kiu signifas timon profundan, kor-preman. Mi sentas ĝin tre forte.
- Sentas, ĉu?
- Jes. Mi ĉiam sentas, kion sentas la homoj. Mi vidas la kolorlumon, kiun ili dis-eligas, kaj mi sentas, kion ili sentas, eĉ se iliaj sentoj estas tre malsimplaj. Sed mi neniam erare konsideras tiujn sentojn kiel miajn.
- Ĉu tio rilatas al via patro?
- Jes. Tion mi ricevis de mia patro. Tion, kaj multajn aliajn strangaĵojn, kies ekziston vi eĉ ne povus imagi.
- Kion, ekzemple?
- Ekzemple la fakton, ke mi ne povas ne ami.
- Kion vi volas diri?
- Ion tre simplan, kion vi certe rimarkis, eĉ se vi neniam vortigis al vi vian rimarkon: mi ne povas malami. Mi eĉ ne povas esti sen-ama, sensenta. Ĉiun homon mi amas. Mi neniam havas eĉ partan malamikecon, kiel ekzemple vi.
- Vi eraras. Mi neniam malamas. Mi neniam malamis iun ajn.
- Tion vi kredas pri vi, sed malprave. Mi scias pro la kolorlumo, kiu eliĝas el vi. Al Daniela, ekzemple, vi supraĵe amikas, sed, profunde, vi malamas ŝin.
- Daniela, ĉu vere? Mi neniam pensis... Jano! Mi timas. Ĉu vere oni povas malami nescie? Sed eble vi pravus. Mi duon-sentas, ke, profunde en mi, vivas ne tre belaj sentoj rilate al Daniela. Kaj vi diras, ke vi ne povas sperti ion similan?
- Ne. Estas al mi neeble. Vi ter-homoj povas malami, mi ne.
- Jano, Jano! Kial vi diras: "vi terhomoj"? Ĉu vi ne rigardas vin terano?
- Mi ne estas tute terano. Iuj diras, ke mi ne estas homo. Tial mi diris, ke se mi rakontos la veron, vi ne kredos min. Mia patro estis ekster-terano.
- Jano! Kion vi rakontas? Vi mokas min, ĉu ne? Tio ne estas tre amika. Ĉu via patro venas el Marso, kaj via patrino el Venuso?
- Ne ridu, Nadja. Mi petegas vin, ne ridu. Mi ne povas malami, sed mi povas suferi. Viaj vortoj suferigas min.
- Pardonu! Sed... estas tiel nekredeble! Klarigu do, kiel tio eblas.
- Mia patrino estis bona, normala loĝantino de la Tero. Ŝi vivis en la kamparo, en soleca domo, sola kun sia patro. Tiuj alimondanoj alteriĝis iom proksime. Ili estas homoj, kvankam ne teranoj: ili havas la saman specon de korpo, spiras aeron kiel ni, manĝas simile... Kvankam mi tion ne povas kompreni, estas certe, ke ni apartenas al

la sama speco de estuloj. Pravas tion, la fakto, ke ili kaj teranoj povas interreproduktiĝi,

- De kie ili venis?

- Mia patrino ne komprenis, ne povis diri al mi. Ŝi diris al mi nur, ke tiu, kiu poste iĝis mia patro, estis tre bela. Ili havis bazon, ie supre. Ili ofte revenis por siaj esploroj per senbrua, preskaŭ nevidebla flugvojaĝilo.

- Kaj la belulo enamiĝis al la juna teranino, ĉu ne?

- Jes. La rilato daŭris iom pli ol jaron. Komence estis malfacile, manke de lingvo, sed iom post iom ili sukcesis inter-kompren-iĝi. Ili suferis, ĉar ili sciis, ke venos fino al ilia rilato, sed ili fortege amis unu la alian. Ili kunkuŝis. Mia patrino naskis min nur kelkajn tagojn post lia lasta reveno-

- Kiom vi aĝis, kiam ŝi rakontis al vi?

- Mi estis naŭjara. Ŝi postulis, ke mi diru al neniu. Nur poste mi komprenis, ke neniu kredus min. Iom post iom, kiam ni estis solaj, ŝi aldonis detalojn.

- Kia stranga sperto!

- Stranga, kaj suferiga! Tiun teruran veron mi devos porti ĝis mia morto, sen iam ajn povi paroli pri ĝi kun iu ajn, krom vi.

- Jano...

- Eble nun vi eĉ forlasos min, eble vi iros demandi kap-kurac-iston. Li diros, ke mi estas freneza, sed ne tre danĝera, tiel ke vi povos vivi kun mi...

- Jano, ĉesu, mi petas. Vi legas miajn pensojn.

- Ne viajn pensojn. Tiujn mi ne povas koni. Nur viajn sentojn. Sed el la sentoj mi tiras supozojn pri via pens-ado. Ho! Jen vi ŝanĝiĝas. Tre rapide. Mi vidas la kolo-rojn. Vi iom post iom akceptas min, rigardas min ver-diranta. Vi akceptas min, vi kredas je mi! Ho, Nadja!

- Mi sciis dekomence, ke estas io eksterordinara pri vi. Ke vi suferas pli ol ni, ke vi amas pli, ke vi kompren-as pli. Ĝuste tio altiris min al vi, sed ankaŭ iom teruris. Nun mi ne plu timas. Nun mi ...

- Nun vi estas tute ĝoja.

- Jes. Kaj mi min demandas, ĉu niaj gefiloj ricevos ion el viaj strangaj ecoj.

- Nu, la respondon al tiu demando nur praktiko konigos al ni. Ĉu ... ĉu vi deziras praktiki?

- Kion?

- Estigon de filo aŭ filino. Persone mi sentas min tute preta.

- Jano!

- Nu, kio?

- Homo vi eble ne tute estas, sed viro tute certe jes.